

PREĜOSEMAJNO  
POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

*Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto*  
(Eli 15,6)

18.-25.01.2018

IKUE Romo/Zagrebo, januaro 2018

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Alberto García Fumero, Ciudad de La Habana, Kubo
- Antonio De Salvo, Guidonia, Italio
- Bernard Schwaiger, Arnstadt, Germanio
- Daniel Cotarelo Garcia, Buenos Aires, Argentino
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- Diego Diaz Mondaca, Santiago, Ĉilio
- Sac. Gabriel Anda, Edea, Kamerunio
- Giovanni Daminelli, Sesto S. Giovanni, Italio
- Im Han-u, Seoul, Koreio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Milton Lacerda, Santos, Brazilo
- Paola Birgit Giommoni, Arezzo, Italio
- Pavol Petrik, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij Prutko, Kievo, Ukrainio
- Veronika Kirsch, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Reviziis: Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija Belošević

*La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)*

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista  
Via di Porta Fabbrica 15  
IT-00165 ROMA RM, Italio

ikue@ikue.org  
ikue.reto@gmail.com  
www.ikue.org  
www.esperokatolika.org  
Fejsbuko de IKUE: [goo.gl/Vv21BD](https://goo.gl/Vv21BD)  
[groups.yahoo.com/group/ikue/](https://groups.yahoo.com/group/ikue/)  
[www.radio-vatikana-esperanto.org](http://www.radio-vatikana-esperanto.org)  
[www.fontoj.net](http://www.fontoj.net)

Estimataj,

En la manoj la sesan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de dek sesopo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco: dekkvar landoj, kaj ĉiuj kontinentoj: Argentino, Brazilo (2), Ĉilio, Francio, Germanio, Hungario, Italio (3), Kamerunio, Koreio, Kroatio, Kubo, Novzelando, Slovakio, Ukrainio.

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memorigi al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero, Lillo kaj Nitro kaj ĉiujtagaj preĝoj dum la Ekumenaj E-kongresoj en Trento kaj Strasburgo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo.

Ne forgesu, ĉi jare okazos la Ekumena Esperanto-Kongreso.

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

*Marija Belošević.*  
vicprezidantino de IKUE



## **PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ 2017**

*Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto (Eli 15,6)*

### **BIBLIA TEKSTO POR LA JARO 2018**

**Eliro 15, 1-21**

Tiam Moseo kaj la Izraelidoj kantis ĉi tiun kanton al la Eternulo, kaj parolis jene: „Mi kantos al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis! Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron. Mia forto kaj glorkanto estas la Eternulo, kaj Li estis por mi savo. Li estas mia Dio, kaj mi Lin gloros, Dio de mia patro, kaj mi Lin altigos. La Eternulo estas viro de milito, Eternulo estas Lia nomo. La ĉarojn de Faraono kaj lian militistaron Li ĵetis en la maron; kaj liaj elektitaj militestroj dronis en la Ruĝa Maro. Abismoj ilin kovris; ili falis en la profundojn kiel ŝtono. Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto, Via dekstra mano, ho Eternulo, disbatas malamikon. Per Via granda majesto Vi frakasas Viajn kontraŭulojn; Vi sendas Vian koleron, kaj ĝi forbruligas ilin kiel pajlon. De Via kolera blovo montiĝis akvo, amasigite stariĝis fluaĵo, densiĝis abismoj en la mezo de la maro. La malamiko diris: Mi persekutos, mi atingos, mi dividos militakiron; satiĝos de ili mia animo; mi eltiros mian glavon, ekstermos ilin mia mano. Vi blovis per Via spirito, kaj ilin kovris la maro; kiel plumbo ili iris al fundo en la akvo potenca. Kiu estas kiel Vi inter la dioj, ho Eternulo? Kiu estas kiel Vi, majesta en sankteco, timinda kaj laŭdinda, faranta miraklojn? Vi etendis Vian dekstran manon, kaj ilin englutis la tero. Vi kondukis kun Via favorkoreco tiun popolon, kiun Vi liberigis, Vi kondukis ĝin per Via forto al Via sankta loĝejo. Aŭdis popoloj kaj ekstremis; teruro atakis la loĝantojn de Filiŝtujo. Tiam ektimis la ĉefoj de Edom; la potenculojn de Moab atakis tremo; perdis la kuraĝon ĉiuj loĝantoj de Kanaan. Falas sur ilin timo kaj teruro pro la grandeco de Via brako; ili mutiĝas kiel ŝtono, ĝis pasas Via popolo, ho Eternulo, ĝis pasas la popolo, kiun Vi akiris. Vi venigos ilin, kaj plantos ilin sur la monto de Via heredo, sur la loko, ho Eternulo, kiun Vi faris Via sidejo, en la sanktejo, ho Sinjoro, kiun pretigis Viaj manoj. La Eternulo reĝos ĉiam kaj eterne“.

Ĉar la ĉevaloj de Faraono kun liaj ĉaroj kaj rajdantoj eniĝis en la maron, kaj la Eternulo turnis sur ilin la akvon de la maro; sed la Izraelidoj iris sur seka tero tra la mezo de la maro. Mirjam, la profetino, fratino de Aaron, prenis tamburinon en sian manon, kaj ĉiuj virinoj eliris post ŝi kun tamburinoj kaj dancante. Kaj Mirjam antaŭkantis al ili: „Kantu al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis; Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron“.

## BIBLIA-PAŝTISTA MEDITO PRI LA TEKSTO (Eliro 15,1-21)

La libro Eliro kondukas nin laŭ tri stadioj: la vivo de la Izraelidoj en Egiptujo (1,1-15,21), la migrado transdezerta de Izraelo (15,22-18,27) kaj la sperto sur Monto Sinaja (19-40). Nia difinita tekstoparto, nome la kanto ekkantita de Moseo kaj Mirjam, priskribas detale la eventojn kondukantajn al la saviĝo de la popolo de Dio el la sklaveco. Tiu ĉi kanto finas la unuan parton de la libro.

*„Li estas mia Dio, kaj mi Lin gloros“ (15,2)*

En la tri unuaj versetoj de ĉapitro 15 centras la laŭdo de Dio: „Mia forto kaj glorkanto estas la eternulo, kaj Li estis por mi savo. Li estas mia Dio, kaj mi Lin gloros, La Dio de mia patro, kaj mi Lin altigos.“ (15,2). En la kanto, ekkantita de Moseo kaj Mirjam, la Izraelidoj laŭdas Dion savintan ilin. Ili nun scias, ke la savoplano Dia por liberigi la popolon povas nek vaniĝi nek malebliĝi. Nenia potenco, eĉ ne la batalĉaroj, la armeo aŭ la elitaj soldatoj de la Faraono malhelpus la Dian volon, ke estu liberigita Lia popolo. (15,4-5) Per tiu ĝojkria laŭdokanto kristanoj de multaj tradicioj esprimas la sperton pri Dio, la savinto de ni ĉiuj. Ni jubilas pri lia promesplenumo, pri lia daŭra savodonado per la Sankta spirito. Per la savo kiun li donas al ni, ni ekkonas, ke li estas nia Dio kaj ke ni estas Lia popolo.

*„Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto“ (15,6)*

La liberigo kaj la savo de la popolo de Dio fariĝas per la forto de Dio. La dekstra mano de Dio povas esti taksata kiel bildo pri la venko de Dio kontraŭ siaj malamikoj kaj kiel ŝirmo fidinda por Lia popolo. Malgraŭ la decidema rezoluteco de la Faraono Dio atentis la plendon de Sia popolo kaj ne faros ke ĝi perdiĝu: ĉar Li estas Dio de la vivo! Ordonante al la ventego kaj al la maro, Dio montras sian volon konservi la vivon kaj fini ĉiun perforon (Eliro 15,10). Per tiu ĉi savo Dio intencas realigi la celon krei popolon de Izraelo, kiu laŭdadas Dion kaj konsciiĝis pri la nerompebla amo.

La liberigo donas al la popolo esperon kaj multesperon. Esperon, ĉar nova tempo estis ekiĝinta, en kiu la Dia popolo povis adoradi en libereco kaj vivi laŭ sia mandato. Kaj ricevis la Izraelidoj la multesperon, ke Dio akompanos sur ilia vojo kaj ke neniu potenco povos malsukcesigi Lian planon por Lia popolo.

*Ĉu Dio uzas perforon por fini perforon?*

Kelkaj ekleziaj patroj komprenas tiun ĉi versetaron kiel metaforon por la vivo spirita. Sankta Aŭgusteno ekzemple opinias la malamikon ĵetitan en la maron ne la egiptoj sed la peko. „Ĉiujn niajn pekojn el la estinteco, kiuj nin kvazaŭ inside de post la dorso premas, Li dronigas kaj forigas per la bapto. Tiujn niajn malhelajn agojn direktis malpuraj spiritoj kiel siajn rajdajn bestojn, kiel veturilojn, kaj ilin ili stiris kiel rajdantoj, kien ajn ili volis. Pro tio ilin nomas la apostolo 'spiritaroj de malbono' (Efesanoj 6,12). Ĉar ni liberiĝis de ili per la bapto kiel en la Ruĝa Maro - sangoruĝe per la savo de la krucumita Sinjoro: ni ne reiru al Egiptujo sed ni strebu tra la aliaj tentoj trans la dezerto per Lia gardo kaj gvido ĝis Lia regno.“ (Sermo 223/E]

Laŭ Aŭgusteno tiu ĉi teksto plikuraĝigas la kristanojn je espero kaj persistemo, je la neperdo de kuraĝo antaŭ la persekuto fare de la malamiko. La bapto estas laŭ Aŭgusteno ŝlosila evento, kiu konstruas la veran identecon de ulo estanta parto de la korpo de Kristo. Li faras paralelon inter la vojo tra la Ruĝa Maro, dum kiu Izraelo estis liberigita, kaj la vojo de la kristana popolo per la bapto. Ambaŭ liberigantaj vojoj estigas liturgian komunumon. Estante tia komunumo, Izraelo ja povis laŭdegi per la kanto de Mirjam kaj Moseo la savantan manon de Dio. Per sia saviĝo la sklavigitaj Izraelidoj iĝis membro de la ununura Dia popolo, kiu en unueco kantas komunan laŭdkanton.

*Unueco*

La 15-a ĉapitro de la libro Eliro montras al ni, ke la vojo je unueco ofte kaj diversmaniere kondukas tra komuna suferosperto. La liberiĝo de la Izraelidoj el sklaveco estas la evento ebliganta la estiĝon de la popolo de Izraelo. Por kristanoj tiu ĉi procedo havas sian kulminon en la homiĝo de Dio kaj en la paska sekreto. Instigo por la liberigo kaj la savo ĉiam kuŝas ĉe Dio, sed Dio respektas homan agadon se temas pri la realigo de Siaj volo kaj plano savi Sian popolon. Per la bapto kristanoj havas sian proporcian parton ene de la Dia repaciĝa planaro. Sed niaj dissplitiĝoj malhelpas kaj niajn depozicifaron kaj nian mision en mondo bezonanta ege la savon fare de Dio.

## **TEOLOGIA-PAŝTISTA ENKONDUKO**

### **Potencia estas via mano, Sinjoro (Eliro 15, 6)**

#### **La Kariba Regiono**

Hodiaŭ, la kariba regiono estas realaĵo multaspekta. Ĝia nomo devenas de unu el la indiĝenaj grupoj tie enloĝantaj: la *Kalinago*, pasintecce nomataj *Caribs*. Ĝia geografia amplekso, kiu entenas kaj kontinentajn kaj insulajn teritoriojn, estigas miksaĵon riĉan je malsamaj etnaj tradicioj, lingvaj kaj religiaj; temas pri realaĵo ankaŭ politike kompleksa, kiu montras variecon de registaraj kaj konstituciaj sistemoj, kiuj varias de la kolonia dependo (angla, nederlanda, franca kaj usona) ĝis la naciaj sendependaj respublikoj.

La nunaj karibaj landoj estas profunde signitaj de la kolonia malhumaniganta ekspluatada plano. Agresive strebante al komercaj enspezoj, la koloniantoj plenumis brutalan sistemon de homkomerco kaj de perfortaj laboroj. Jam de la komenco ĉi tiaj kutimoj sklavigis, dekumis, kaj kelkafoje ekstermis la indiĝenajn popolojn de la regiono. Postsekvis la sklavigo de la Afrikanoj kaj sklavecaj labormanieroj altruditaj al homoj el Hindujo kaj Ĉinio.

En ĉiu fazo de ĉi tiu procedo, la koloniantoj sisteme klopodis senigi la submetitajn popolojn je iliaj nefordoneblaj rajtoj: ilia identeco, la homa digno, la libereco kaj ilia memdecido. La fenomeno de la sklavigo de la Afrikanoj, ne estis limigita al la simpla transportado de laboristoj de unu lando al alia, sed ĝi prezentiĝis kiel ofendo kontraŭ la homa digno, donaco de Dio; ĝi reduktis al varo la homan personon iginte homan estaĵon propraĵo de kromaj personoj. Kun la pretendo, ke la sklavoj estas propraĵo, disvastiĝis aliaj praktikadoj, kiuj kondukis al la malhomecigo de la Afrikanoj, inter tio al la neado de la rajto pri la kultura kaj religia praktikadoj kaj al la geedza kaj familia vivo.

Bedaŭrinde, dum la kvin jarcentoj de koloniismo kaj sklavismo, la misia agado de la kristanoj en tiu regiono, krom kelkaj notindaj ekzemploj, estis en strikta koluzio kun tiuj malhomecigaj sistemoj kaj ofte donis al ili raciajn pravigojn kaj plifortigis ilin. Tamen, kie, tiuj, kiuj alportis la Biblion en tiun regionon, utiligis la Biblion por pravigi submeton de katenita popolo, tie, en la manoj de la sklavoj, ĝi fariĝis, kontraŭe, inspiro kaj certigo, ke Dio estas je ilia flanko kaj ke Li kondukos ilin al la libereco.

#### **La temo de la Preĝsemajno por la unueco de la kristanoj 2018.**

Hodiaŭ la karibaj kristanoj, apartenantaj al diversaj tradicioj, vidas la manon de Dio en la fino de la sklaveco. La sperto de la sava agado de Dio, kiu alportas liberon, estas signo de unueco. Pro tio ŝajnis tre taŭga la elekto de la kantiko de Moseo kaj Miriam (*Eliro 15, 1-21*) kiel temo de la Preĝsemajno 2018. Ĝi estas triumfa kanto pri la subpremado. Ĉi tiun temon oni transigis en himnon titolitan *The Right Hand of God* (La dekstra mano de Dio), verkitan dum kunveno de la Karibaj Eklezioj en Aŭgusto 1981. Ĝi iĝis "himno" de la Ekumena movado en la regiono kaj estis tradukita en plurajn lingvojn.

Kiel la Izraelidoj, ankaŭ la karibaj popoloj havas por kanti sian kanton de venko kaj liberigo, kaj ĝi estas unuiga kanto. Tamen, kelkaj nuntempaj defioj ankoraŭ konsistigas minacon de nova sklaveco kaj minacon kontraŭ la digno de la homa persono, kreita laŭ la bildo de Dio. Kvankam la homa digno estas nefordonebla, tamen ĝi estas ofte obskurigita, ĉu de persona peko, ĉu de sociaj strukturoj de peko. En nia mondo, signita de la peko, tro ofte niaj sociaj rilatoj ne plenumas la devigan justecon kaj kompaton, kiuj honoras la homan dignon. Malriĉeco, perforto, maljusteco, toksikodependo, pornografio, kaj la konsekvencaj doloro, malgajeco, angoro estas spertoj, kiuj tordas la homan dignon. Multaj el la problemoj, kiuj aflikta la karibajn popolojn hodiaŭ estas heredaĵo de la kolonia pasinteco kaj de la sklavkomercado. Ĉi tiu vundo, je kolektiva nivelo, sin montras en sociaj problemoj kunligitaj ĉu al malalta memestimo, ĉu al la estigo de bandoj kaj de hejma perfortado, kaj tio domaĝas la familiajn interrilatojn. Kvankam heredaĵo de la pasinteco, ĉi tiuj realaĵoj estas eĉ pliakrigitaj de la nuntempa situacio, kiun multaj nomus nov-koloniismo. En la nunaj cirkonstancoj, fakte, ŝajnas preskaŭ neeble por multaj nacioj de ĉi tiu regiono eliri el la kondiĉo de malriĉeco kaj ŝuldo. Krome, en multaj lokoj, plurestis leĝa kadro daŭre diskriminacia.

La mano de Dio, kiu kondukis la popolon ekster la sklavecon, donante daŭran esperon kaj kuraĝon al la Izraelidoj, daŭrigas inspiri esperon al la karibaj kristanoj. Ili ne estas viktimoj de la cirkonstancoj. Atestante ĉi tiun komunan esperon, la eklezioj kune laboras en la servo de ĉiuj loĝantoj de la regiono, sed precipe de la plej vundeblaj kaj neglektataj; kiel en la vortoj de la himno: „la mano de Dio prisemas la teron; ĝi plantas semojn de libero, espero kaj amo”.

## **PREPARO DE MATERIALOJ POR LA SEMAJNO DE PREĜO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ DE 2018**

La Karibaj Eklezioj estis elektitaj por redakti la malneton de la materialoj por la Semajno de Preĝo por la Unueco de la Kristanoj de 2018. Sub la gvido de monsinjoro Kenneth Richards, katolika episkopo de Kingston kaj episkopo respondeca pri ekumenaj aferoj en la Episkopara Konferenco de la Antiloj, kune kun Gerard Granado, ĝenerala sekretario de la Konferenco de Karibaj Eklezioj (CCC, laŭ la anglalingvaj komencliteroj), estis starigita ekumena skipo, konsistanta el viroj kaj virinoj, por redakti la materialojn.

Oni dankas la respondeculojn de CCC, la Episkopan Konferencojn de Antiloj kaj ĉiujn, kiuj kunlaboris en la kreado de ĉi tiuj materialoj:

- Rev. Kenneth D. Richards, kunordiganto de la redaktoskipo de la malneto nome de la Episkopara Konferenco de Antiloj (AEC, laŭ la anglalingvaj komencliteroj), prezidanto de la Komisiono de AEC por Ekumenismo, ĉefepiskopo de Kingston (romkatolika) [Jamajko].
- S-ro Gerard A.J. Granado, M.T. (Edinburgo), ĝenerala sekretario de la Konferenco de Karibaj Eklezioj (CCC), kunvokinto de la redaktoskipo (romkatolika) [Trinidado kaj Tobago]
- Prof. Luis N. Rivera-Pagan, emerita profesoro pri Ekumenismo, Teologia Seminario Princeton, N.J. (baptisto) [Porto-Riko]
- Rev. Kirkley Sands, F.D., kapelpastro, Teologia Altlernejo Codrington (anglikano), Eklezio en la provinco de Okcidenta Hindio [Bahamoj].
- Rev. Patmore Henry, sekretario, Koneksa Konferenco, Metodista Eklezio de Karibo kaj Ameriko (MCCA, laŭ la anglalingvaj komencliteroj) [insulo Antigvo].
- Oluwakemi Linda Banks, F.D., unu el la prezidantoj de CCC kaj klinikipsikologo (anglikano) [insulo Angvila]
- S-rino Nicole Poyer, gvidanto, Grupo Taizé (ekumena) de Trinidado kaj Tobago, registrita studento en Teologia Magistrecio (romkatolika) [Trinidado kaj Tobago]
- Plej Rev. Glenna Spencer, episkopo, Metodista Eklezio de Karibo kaj Ameriko (MCCA) kaj eksmembro de la Centra Komitato de la Monda Konsilio de Eklezioj (CMI) [Gujano]
- Plej Rev. Kingsley Lewis, F.D., episkopo, Fratara de Moravio (orienta provinco de Okcidenta Hindio), emerita prezidanto de CCC [insulo Antigvo]
- Rev. Elvis Elahie, F.D. (Edinburgo), emerita moderiganto, Presbiteriana Eklezio de Trinidado kaj Tobago (PCTT, laŭ la anglalingvaj komencliteroj) kaj emerita direktoro de Teologia Altlernejo de Sankta Andreo [Trinidado kaj Tobago]
- Rev. Marjorie Lewis, F.D., emerita prezidanto, Unuiĝinta Teologia Altlernejo de Okcidenta Hindio (UTCWI, laŭ la anglalingvaj komencliteroj) (Unuiĝinta Eklezio de Jamajko kaj Kajmana Insularo) [Jamajko]
- Rev. George Mulrain, F.D., emerita koneksa prezidanto, Koneksa Konferenco, Metodista Eklezio de Karibo kaj Ameriko (MCCA) [Trinidado kaj Tobago]

La loka redaktoskipo prezentis la tekstojn, preĝojn kaj meditojn, kiujn estis elektinta internacia skipo kunaŭspiciita de la Papa Konsilio por la Antaŭenigo de la Unueco de la Kristanoj (PCPUC) kaj la Monda Konsilio de Eklezioj (CMI). En tiu kunveno, kiu okazis en restadejo Emaus en Nasaŭo (Bahamoj), de la 3-a ĝis la 7-a de septembro de 2016, oni finis la redakton de la malneto. La internacia skipo povis viziti la Muzeon de Sklaveco kaj Liberigo de Pompey en la „Domo Vendue“, vizito kiu helpis la eldonan skipon honori la luktojn por la libereco de la popoloj de Bahamoj kaj de tuta Karibo.

La internacia skipo deziras danki ĉefepiskopon Patrick Pinder kaj la ĉefdiocezon de Nasaŭo pro ties sindono gastigi ĝin en la Centro Emaus, kaj la dungitaron de la domo, kiu igis ilian restadon agrabla. Ni ankaŭ deziras esprimi nian dankon pro la subteno ricevita de la gvidantoj de la lokaj Eklezioj, Rev. D-ro Ranford Patterson, prezidanto de la Kristana Konsilio de Bahamoj, kaj Rev. Laish Boyd, dioceza episkopo, anglikana Diocezo de Bahamoj, Turkoj kaj Kajkoj, kiuj aliĝis al la grupo por partoprenigi sian saĝecon kaj konon pri la loka Eklezio.



## EKUMENA DISERVO

### Enkonduko

*Via dekstra mano, Sinjoro, plena je potenco (Eli 15,6)*

Por tiu celebrado, oni nepre bezonos Bibliion, kaj tri katenoj. La loka grupo de Kariboj sugestas, ke la simboloj estu bone videblaj en la loko kie okazas la Diservo.

En la vivo de la Karibaj eklezioj, la Biblio estas ege grava. Dum la sklava epoko, la denaskaj popoloj travivis neelteneblajn mortigadojn fare de la koloniistoj, kiuj samtempe alportis kristanisman. Tamen en la manoj de tiuj popoloj la Biblio iĝis esenca fonto por konsoli kaj liberigi. Pro tio la Biblio estas efika simbolo en ĝi mem.

Ankaŭ gravas, ke dum tiu celebrado estu planita kaj malfermita granda Biblio meze de la popolo, kaj ĉiujn legaĵojn oni faru de tie kaj ne el broŝuroj aŭ aliaj libroj.

La kernoj estas potencaj simboloj de sklavado, de senhumanismo kaj rasismo. Ili estas ankaŭ simbolo de la potenco de la peko kiu foririgas nin de Dio kaj unuj de la aliaj.

La loka grupo de Kariboj proponas, ke dum la preĝo de la reunuigo en la celebrado, oni uzu verajn katenojn el fero. Se oni ne povas uzi ferajn katenojn, oni devas uzi aliajn katenojn kun videbla forta impresio. Dum la ekumena diservo oni anstataŭigos la sklavajn katenojn per la homaj ĉenoj, kiuj signifas la komunan agadon kontraŭ la moderna sklaveco, kaj ĉiuj formoj de individua kaj starigita malhumaneco.

La loka grupo de Karibio proponas, ke post la proklamo de la vorto oni kantu kun vigeleco la himnon: „La dekstra mano de Dio“, kiu memorigas la kanton de Myryam kaj Moseo pri la liberiga agado de Dio en la libro Eliro.

Tiu kanto estas kunigita al la ekumena movado en Karibio, ĉar la eklezioj kunlaboras por batali kontraŭ la sociaj defioj de la popoloj en tiu regiono.

## DISERVO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ 2018

*Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto (Eliro, 15,6)*

**G: Gvidanto\***

**L: Leganto\***

**Ĉ: Ĉiuj**

*\*Laŭ la lokaj kondiĉoj povas esti pli ol unu gvidanto kaj leganto.*

### I. KOLEKTADO KAJ ENIRA KANTO

*Dum la komenca kanto, eniras tiuj, kiuj gvidos la diservon. Ili devas antaŭiĝi de la asistanto kiu portas la Bibliion. La Biblio metiĝas sur distingiĝa loko, meze de la diserva spaco. La legaĵoj de la Skribo dum la diservo devas proklamiĝi komence ekde tiu Biblio.*

#### **Bonvenigaj vortoj**

**G:** En la nomo de la Patro, kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito

**Ĉ:** Amen.

**G:** La graco de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun vi ĉiuj.

**Ĉ:** Kaj kun vi ankaŭ.

**G:** Karaj geamikoj en Kristo, kuniĝintaj por tiu preĝodiservo por la unueco, ni dankas Dion pro nia kristana heredo, pro Lia sava kaj liberiga agado ĉe la historio de la homaro.

La materialo por la ĉijara Preĝosemajno por la Unueco de la Kristanoj estis pretigita de la Eklezioj de Karibio. La historio de kristanismo ĉe tiu regiono enhavas paradokson. Unuflanke la Biblio estis uzita de la koloniistoj por justigi la subigon de la origina loĝantaro de tiuj landoj, kune kun aliaj transportitaj el Afriko, Hindio kaj Ĉinio. Multaj estis ekstermitaj, katenigitaj, sklavigitaj kaj submetitaj je maljustaj kondiĉoj de laboro. Aliflanke, la Biblio fariĝis fonto de konsolo kaj liberigo por multaj, kiuj suferis sub la manoj de la koloniistoj.

Hodiaŭ, la Biblio daŭras esti fonto de konsolo kaj liberigo, inspirante la kristanojn de Karibio alfronti la kondiĉojn, kiuj nun malhelpas la homan dignon kaj la vivkvaliton. Kiam la sklavigaj ferkatenoj falas el niaj manoj, nova interkonsento de amo kaj kuneco elmergiĝas ĉe la homa familio, esprimante la unuecon por kiu ni preĝas en niaj kristanaj komunumoj.

## II. ALVOKO AL LA SANKTA SPIRITO

*La respondo al la alvoko povas esti kantata.*

**G:** Kune kun la Karibaj kristanoj, ni aklamu petante de la Sankta Spirito, ke Lia fajro venu al niaj koroj, dum ni preĝas por la unueco de la Eklezio.

**G:** Unuigu viajn servantojn per la ligo de la unueco.

**Ĉ:** Venu, Sankta Spirito!

**G:** Instruu nin preĝi!

**Ĉ:** Venu, Sankta Spirito!

**G:** Liberigu nin el la sklaveco de la peko.

**Ĉ:** Venu, Sankta Spirito!

**G:** Helpu nin en nia malforteco.

**Ĉ:** Venu, Sankta Spirito!

**G:** Restarigu nin kiel viajn filojn.

**Ĉ:** Venu, Sankta Spirito!

### Laŭda kanto

## III. PREĜOJ POR REPACIGO

**G:** Ni ne ricevis spiriton de sklaveco, kiu faligus nin denove en timon. Ni petu la mizerikordon de la Sinjoro, fidante pri la sava povo de la dekstra mano de nia Dio.

*Tri membroj de la kunveno venas antaŭen, ĉiu portante katenon. Post la peto kaj respondo, ĉiu kateno forlasigas surgrunden. La Kyrie povas esti kantata.*

**G:** El la strukturoj, kiuj ofendas homan dignon kaj plifortigas novajn formojn de sklaveco, liberigu nin, ho Dio. Kyrie eleison.

**Ĉ:** Kyrie eleison.

**G:** El la decidoj kaj agoj kiuj naskas malriĉecon, marĝenigon aŭ disigon por niaj gefratoj, liberigu nin, ho Dio. Kyrie eleison.

**Ĉ:** Kyrie eleison.

**G:** El timo kaj suspektemo, kiuj disigas nin unuj el aliaj kaj metas limojn al espero kaj kuracado, liberigu nin, ho Dio. Kyrie eleison.

**Ĉ:** Kyrie eleison.

**G:** La Sinjoro estas nia forto kaj nia povo, kaj fariĝis nia savo. Ni petu de Dio, kiu elaĉetis nin, ke Li konduku nin al la domo de sankteco.

**Ĉ:** Amen!

#### IV. PROKLAMO DE LA DIA VORTO

**G:** Liberigu nin, ho Dio, de homa premado,

**Ĉ:** kaj mi observos Viajn ordonojn.

**G:** Lumu per Via vizaĝo sur Vian sklavon,

**Ĉ:** kaj instru al mi Viajn leĝojn (vidu Psa 119: 134-135)

#### Unua legaĵo: Eliro 15, 1-21

Tiam Moseo kaj la Izraelidoj kantis ĉi tiun kanton al la Eternulo, kaj parolis jene: „Mi kantos al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis! Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron. Mia forto kaj glorkanto estas la Eternulo, kaj Li estis por mi savo. Li estas mia Dio, kaj mi Lin gloros, Dio de mia patro, kaj mi Lin altigos. La Eternulo estas viro de milito, Eternulo estas Lia nomo. La ĉarojn de Faraono kaj lian militistaron Li ĵetis en la maron; kaj liaj elektitaj militestroj dronis en la Ruĝa Maro. Abismoj ilin kovris; ili falis en la profundojn kiel ŝtono. Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto, Via dekstra mano, ho Eternulo, disbatas malamikon. Per Via granda majesto Vi frakasas Viajn kontraŭulojn; Vi sendas Vian koleron, kaj ĝi forbruligas ilin kiel pajlon. De Via kolera blovo montiĝis akvo, amasigite stariĝis fluaĵo, densiĝis abismoj en la mezo de la maro. La malamiko diris: Mi persekutos, mi atingos, mi dividos militakiron; satiĝos de ili mia animo; mi eltiros mian glavon, ekstermos ilin mia mano. Vi blovis per Via spirito, kaj ilin kovris la maro; kiel plumbo ili iris al fundo en la akvo potenca. Kiu estas kiel Vi inter la dioj, ho Eternulo? Kiu estas kiel Vi, majesta en sankteco, timinda kaj laŭdinda, faranta miraklojn? Vi etendis Vian dekstran manon, kaj ilin englutis la tero. Vi kondukis kun Via favorkoreco tiun popolon, kiun Vi liberigis, Vi kondukis ĝin per Via forto al Via sankta loĝejo. Aŭdis popoloj kaj ekstremis; teruro atakis la loĝantojn de Filiŝtujo. Tiam ektimis la ĉefoj de Edom; la potenculojn de Moab atakis tremo; perdis la kuraĝon ĉiuj loĝantoj de Kanaan. Falas sur ilin timo kaj teruro pro la grandeco de Via brako; ili mutiĝas kiel ŝtono, ĝis pasas Via popolo, ho Eternulo, ĝis pasas la popolo, kiun Vi akiris. Vi venigos ilin, kaj plantos ilin sur la monto de Via heredo, sur la loko, ho Eternulo, kiun Vi faris Via sidejo, en la sanktejo, ho Sinjoro, kiun pretigis Viaj manoj. La Eternulo reĝos ĉiam kaj eterne“.

Ĉar la ĉevaloj de Faraono kun liaj ĉaroj kaj rajdantoj eniĝis en la maron, kaj la Eternulo turnis sur ilin la akvon de la maro; sed la Izraelidoj iris sur seka tero tra la mezo de la maro. Mirjam, la profetino, fratino de Aaron, prenis tamburinon en sian manon, kaj ĉiuj virinoj eliris post ŝi kun tamburinoj kaj dancante. Kaj Mirjam antaŭkantis al ili: „Kantu al la Eternulo, ĉar Li alte leviĝis; Ĉevalon kaj ĝian rajdanton Li ĵetis en la maron“.

**G:** Vi aŭdu kaj liberiĝos.

**Ĉ:** Dankon al la Sinjoro!

#### Psalmo 118, 5-7.10-24

**Ĉ:** Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

**L:** El premateco mi vokis al la Eternulo,  
Kaj per liberigo respondis al mi la Eternulo.  
La Eternulo estas kun mi, mi ne timas;  
Kion faros al mi homo?  
La Eternulo estas kun mi, kiel mia helpanto;  
Kaj mi triumfos super miaj malamikoj.

**Ĉ:** Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

**L:** Ĉiuj popoloj min ĉirkaŭis,  
Sed per la nomo de la Eternulo mi ilin disbatos.  
Ili ĉirkaŭis min de ĉiuj flankoj,  
Sed per la nomo de la Eternulo mi ilin disbatos.  
Ili ĉirkaŭis min kiel abeloj,  
Sed ili estingiĝas, kiel fajro en dornoj;  
Per la nomo de la Eternulo mi ilin disbatos.

Ĉ: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

D: Oni min puŝis, ke mi falu;  
Sed la Eternulo min helpis.  
La Eternulo estas mia forto kaj mia kanto,  
Kaj Li fariĝis mia savo.

Ĉ: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

D: La voĉo de triumfo kaj de saviĝo sonas en la tendoj de la virtuloj:  
La dekstra mano de la Eternulo faras heroaĵojn;  
La dekstra mano de la Eternulo estas alte,  
La dekstra mano de la Eternulo faras heroaĵojn.  
Mi ne mortos, sed mi vivos,  
Kaj mi rakontos la farojn de la Eternulo.

Ĉ: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

D: Per forta puno punadis min la Eternulo,  
Sed al la morto Li min ne donis.  
Malfermu al mi la pordegojn de la vero;  
Mi iros tra ili, mi gloros la Eternulon.  
Jen estas la pordego de la Eternulo;  
Virtuloj iras tra ĝi.

Ĉ: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

D: Mi dankas Vin,  
Ĉar Vi aŭskultis min kaj fariĝis mia savo.  
Ŝtono, kiun malŝatis la konstruantoj,  
Fariĝis ŝtono bazangula.  
De la Eternulo ĉi tio fariĝis,  
Ĝi estas miraklo en niaj okuloj.  
Ĉi tiun tagon faris la Eternulo;  
Ni ĝoju kaj gajiĝu en ĝi.

Ĉ: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj, ĉar Li estas bona; ĉar eterna estas Lia boneco.

### **Dua legaĵo: Romanoj 8, 12-27**

Tial do, fratoj, ni estas ŝuldantoj, ne al la karno, por vivi laŭ la karno; ĉar se vi vivas laŭ la karno, vi mortos; sed se per la spirito vi malvivigas la farojn de la korpo, vi vivos. Ĉar ĉiuj, kiuj estas kondukataj de la Spirito de Dio, estas filoj de Dio. Ĉar vi ne ricevis la spiriton de sklaveco denove al timo; sed vi ricevis la spiriton de adopto, per kiu ni krias: Aba, Patro. La Spirito mem kunatestas kun nia spirito, ke ni estas idoj de Dio; kaj se idoj, tial heredantoj, heredantoj de Dio, kunheredantoj kun Kristo, se vere ni suferas kun li, por ke ni estu glorataj kun li.

Ĉar mi kalkulas, ke la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝota al ni. Ĉar la fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio. Ĉar la kreitaro subiĝis sub la vanecon, ne volonte, sed, pro la subiganto, kun espero, ke la kreitaro mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereco en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio. Ĉar ni scias, ke la tuta kreitaro kune ĝemas kaj naskodoloras ĝis nun. Kaj krom tio, ni mem, kiuj havas la unuaaĵon de la Spirito, ĝemas en ni, atendente nian adopton, nome la elaĉeton de nia korpo. Ĉar per espero ni estas savitaj; sed la espero, kiu estas vidata, ne estas espero; ĉar kiu esperas al tio, kion li vidas? Sed, se ni esperas al tio, kion ni ne vidas, tiam ni ĝin atendas pacience.

Kaj tiel same la Spirito ankaŭ helpas nian malfortecon; ĉar ni ne scias, kiel preĝi dece, sed la Spirito mem propetas por ni per ĝemoj neeldireblaj; kaj Tiu, kiu esploras la korojn, scias, kio estas la penso de la Spirito, ĉar li propetas por la sanktuloj laŭ la volo de Dio.

L: Vi aŭdu kaj liberiĝos.

Ĉ: Dankon al Dio!

*Taŭga aklamo de Haleluja povas esti kantata antaŭ kaj post la proklamo de la Evangelio.*

### **Evangelio: Marko 5,21-43**

Kaj kiam Jesuo retransiris en la ŝipeto al la alia bordo, granda homamaso kolektiĝis al li; kaj li estis apud la maro. Kaj venis unu el la sinagogestroj, nomata Jairo, kaj ekvidinte lin, falis antaŭ liaj piedoj, kaj insiste lin petegis, dirante: Mia filineto estas en lasta ekstremo; venu do kaj metu viajn manojn sur ŝin, por ke ŝi saviĝu kaj vivu. Kaj li iris kun li, kaj granda homamaso sekvis lin kaj premis lin. Kaj virino, kiu jam dek du jarojn havis sangofluon, kaj multe suferis pro multaj kuracistoj, kaj elspezis sian tutan havon, kaj estis neniel helpita, sed kontraŭe eĉ pli malsaniĝis, aŭdinte pri Jesuo, venis en la homamaso malantaŭ lin, kaj tuŝis lian mantelon. Ĉar ŝi diris: Se mi nur tuŝos lian mantelon, mi estos sanigita. Kaj tuj la fonto de ŝia sango sekiĝis, kaj ŝi korpe sentis, ke ŝi resaniĝis el sia malsano. Kaj Jesuo, tuj sentante en si, ke la potenco eliris, turnis sin en la homamaso, kaj diris: Kiu tuŝis mian veston? Kaj liaj disĉiploj diris al li: Vi vidas la homamason, premantan vin, kaj ĉu vi diras: Kiu min tuŝis? Kaj li ĉirkaŭrigardis, por vidi tiun, kiu tion faris. Sed la virino, timigita kaj tremanta, sciante, kio fariĝis al ŝi, venis kaj falis antaŭ li, kaj diris al li la tutan veron. Kaj li diris al ŝi: Filino, via fido vin savis; iru en paco, kaj estu sana el via malsano. Dum li ankoraŭ parolis, oni venis el la domo de la sinagogestro, dirante: Via filino mortis; kial vi ankoraŭ ĝenas la instruiston? Sed Jesuo, ne atentante la parolon diritan, diris al la sinagogestro: Ne timu, nur kredu. Kaj li ne permesis al iu sekvi kun li, krom Petro kaj Jakobo, kaj Johano, frato de Jakobo. Kaj ili venis al la domo de la sinagogestro, kaj li vidis tumulton, kaj homojn plorantajn kaj funebre ĝemantajn. Kaj enirinte, li diris al ili: Kial vi tumultas kaj ploras? la infanino ne mortis, sed dormas. Kaj ili mokridis lin. Tamen, foriginte ĉiujn li kondukis la patron de la infanino kaj la patrinon, kaj tiujn, kiuj estis kun li, kaj eniris tien, kie estis la infanino. Kaj preninte la manon de la infanino, li diris al ŝi: Talita kumi; tio estas: Knabineto, mi diras al vi: Leviĝu. Kaj tuj leviĝis la knabineto kaj piediris; ĉar ŝi estis dekdujara. Kaj ili miris kun granda mirego. Kaj li severe admonis ilin, ke neniu sciiĝu pri tio; kaj li ordonis doni al ŝi manĝi.

**D:** Vi aŭdu kaj liberiĝos.

**Ĉ:** Dankon al Dio!

### **Homilio**

### **Kanto**

## **V. APOSTOLA KREDO-KONFESO**

Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,  
la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;  
kaj je Jesuo Kristo,  
Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,  
koncipita per la Sankta Spirito,  
naskita el Maria la Virgulino,  
suferinta sub Poncio Pilato,  
krucumita, mortinta kaj entombigita,  
sobirinta en la regnon de la morto.  
La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,  
supren-iris al la ĉielo,  
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,  
de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.  
Mi kredas je la Sankta Spirito,  
la sankta katolika\* eklezio,  
la komuno de la sanktuloj,  
la pardono de la pekoj,  
la releviĝo de la mortintoj,  
kaj la vivo eterna.  
Amen.

## VI. PREĜO POR LA POPOLO

**G:** Dankante pro nia liberiĝo el la sklaveco al peko, ni metu niajn necesojn antaŭ la Sinjoro, petante ke Li rompu la katenojn kiuj sklavigas nin kaj ke, anstataŭe, unuigu nin pel la ligoj de amo kaj komuneco.

*Ĉiu preĝpeto proklamiĝas per malsama leganto. Fine, ĉiu el la legantoj unuigas siajn manojn aŭ brakojn kun la membroj de la kunveno, tiel starigante homan ĉenon.*

**L:** Dio de la Eliro, Vi kondukis Vian popolon tra la akvoj de Ruĝa Maro kaj elaĉetis ĝin. Restu kun ni nun kaj liberigu nin el ĉiuj formoj de sklaveco kaj de ĉio, kio malklarigas la homan dignon.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

**L:** Dio de tuta abundeco, laŭ Via boneco Vi zorgas ĉiujn niajn necesojn. Restu kun ni nun, helpu nin superi la egoismon kaj ambicion, kaj donu al ni la kuraĝon esti agantoj de justeco en la mondo.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

**L:** Dio de Amo, Vi kreis nin laŭ Via bildo kaj elaĉetis nin en Kristo. Restu kun ni nun, kapabligu nin por ami nian proksimulon kaj gastigi la migranton.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

**L:** Dio de la Paco, Vi restas fidela al Via Interligo kun ni, eĉ kiam ni distanciĝas de Vi, kaj en Kristo Vi repacigis nin al Vi. Restu kun ni nun, kaj metu novan spiriton kaj novan koron en nin, por ke ni povu forĵeti perforton kaj, aliflanke, esti servantoj de Via paco.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

**L:** Dio de la gloro, Vi estas ĉiopova kaj, eĉ tiel, en Kristo, Vi elektis havi hejmon en homa familio, kaj per la akvoj de Bapto, vi adoptis nin kiel Viajn gefilojn. Restu kun ni nun kaj helpu nin resti fidelaj al niaj familiaj sindevigoj kaj al niaj komunumaj respondecetoj, kaj plifortigi la ligojn de komuneco kun niaj gefratoj en Kristo.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

**L:** Dio, Unu en tri Personoj, en Kristo Vi faris nin Unu kun Vi kaj unu kun la aliaj. Restu kun ni nun kaj, per la povo kaj konsolo de la Sankta Spirito, liberigu nin el la memcentrismo, el la aroganteco kaj el la timo, ke oni malpermesos al ni intense labori por la videbla unueco de Via Eklezio.

**Ĉ:** Metu Viajn manojn super ni, ho Sinjoro, por ke ni povu vivi.

## VII. LA PREĜO DE LA SINJORO KAJ INTERŜANĜO DE LA PACSIGNO

**G:** Ni unuigu niajn manojn, sekuraj ne per katenoj sed per la amo de Kristo, kiu estis verŝita en niajn korojn, kaj ni preĝu al la Patro per la vortoj kiujn Jesuo instruis al ni.

*La preĝo Patro Nia povas esti kantata.*

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,  
sanktigata estu Via nomo.  
Venu Via regno.  
Fariĝu Via volo,  
kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.  
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.  
Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,  
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.  
Kaj ne konduku nin en tenton,  
sed liberigu nin de la malbono.  
Ĉar Via estas la regno  
kaj la potenco  
kaj la gloro eterne.  
Amen.

*Post la preĝo de la Sinjoro, ankoraŭ kun interplektitaj manoj, la kunveno povas kanti familiaran kanton, kiu celebros la unuecon.*

*Post la kanto, la homoj salutas sin reciproke kiel signo de paco.*

### **VIII. BENO KAJ SENDADO**

**G:** Elaĉetitaj per la dekstra mano de Dio, kaj unuigitaj en la ununura Korpo de Kristo, ni iru antaŭen, subtenitaj de la povo de la Sankta Spirito.

**Ĉ:** La Spirito de la Eternulo estas sur mi,

Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj;

Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj

Kaj vidpovon al blinduloj,

Por meti la vunditojn en liberecon,

Por proklami favorjaron de la Eternulo.

Amen! Haleluja!

**G:** Al Vi ni petegas, tre kompatema Dio:

Ke ĉiuj serĉantaj repacigon sentu Vian helpon, por ke povos proklami Viajn grandegajn agojn de Amo! Tio ĉi ni petas en la nomo de Via Filo, Jesuo Kristo nia Sinjoro.

**Ĉ:** Amen.

**G:** Ke la beno de la Ĉiopova Dio, Patro kaj Filo kaj Sankta Spirito, venu sur vin kaj restu kun vi por ĉiam.

**Ĉ:** Amen.

**G:** Iru en la paco de Dio!

**Ĉ:** Danke al Dio!

**Fina kanto**

## **Tago 1-a: Vi devas ami ankaŭ la fremdulojn, ĉar ankaŭ vi estis fremdulo en Egiptujo**

### **Legajoj**

*Unua legaĵo: Lev 19,33-34 Kaj se ekloĝos ĉe vi fremdulo en via lando, ne premu lin.*

Kaj se ekloĝos ĉe vi fremdulo en via lando, ne premu lin. Kiel indiĝeno el inter vi estu por vi la fremdulo, kiu ekloĝis ĉe vi, kaj amu lin kiel vin mem, ĉar fremduloj vi estis en la lando Egipta: Mi estas la Eternulo, via Dio.

*Psalmo: 146 La Eternulo gardas la enmigrintojn*

Gloru, ho mia animo, la Eternulon.  
Mi gloros la Eternulon en la daŭro de mia tuta vivo,  
Mi kantos al mia Dio tiel longe, kiel mi estos.

Ne fidu eminentulojn,  
Homidon, kiu ne povas helpi.  
Eliras lia spirito, li reiras en sian teron;  
Kaj en tiu tago neniĝas ĉiuj liaj intencoj.

Bone estas al tiu, kies helpo estas la Dio de Jakob,  
Kiu esperas al la Eternulo, lia Dio,  
Kiu kreis la ĉielon kaj la teron,  
La maron, kaj ĉion, kio estas en ili,  
Kiu gardas la veron eterne;  
Kiu faras justecon al la prematoj,  
Donas panon al la malsataj.

La Eternulo liberigas la malliberulojn;  
La Eternulo malfermas la okulojn al la blinduloj;  
La Eternulo restarigas la kurbigitojn;  
La Eternulo amas la virtulojn;

La Eternulo gardas la enmigrintojn,  
Subtenas orfon kaj vidvinon;  
Sed la vojon de malvirtuloj Li pereigas.  
La Eternulo reĝas eterne,  
Via Dio, ho Cion, por ĉiuj generacioj.

*Dua legaĵo: Heb 13,1-3 Ne forgesu gastamon al nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn, ne sciante.*

La fratamo daŭradu. Ne forgesu gastamon al nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn, ne sciante. Memoru la katenitojn, kvazaŭ vi ankaŭ estus katenitaj, kaj la suferantojn, ĉar vi ankaŭ estas en la korpo.

*Evangelio: Mat 25,31-48 Mi estis fremda, kaj vi gastigis min*

Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro; kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn maldekstre. Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo; ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi gastigis min; nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis, kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi. Tiam respondos al li la justuloj, dirante: Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis? aŭ soifanta, kaj trinkigis vin? Kaj kiam ni vidis vin fremda kaj gastigis vin? aŭ nuda, kaj vin vestis?

\*



*Post Haitio ekhavis la unuan nigran respublikon tiuj popoloj, kiuj klopodis havi liberecon kaj gastamon. En ĉi tiuj tempoj la popolo de Haitio suferas pro ekonomia situacio. Multaj forlasas sian patrolandon, en la espero, ke ili trovos aliloke pli bonan vivon, dumvoje havante grandajn danĝerojn. En la celo ofte ili trovas mankantan gastamon kaj juran barieron. La kariba eklezia konsilio apartenas al tiuj, kiuj staras kontraŭ tiuj landoj, kie oni fortranĉis la civilrajton de la haitianoj aŭ tute ne estas atentemaj por la rajtoj de la migrantoj.*

### **Komento**

Dio donis por Izrael, al Sia elektita popolo, tiun ordonon, ke ili bonvenigu la fremdulojn inter ili. Li klarigas tiun ĉi ordonon, kaj Li anoncas la historion de la izraelidoj, kiuj ankaŭ estis fremduloj en Egiptujo. La rememoro pri propra mallibereco en Egiptujo, rememorigu ilin por empatio kaj solidareco al la fremduloj en la nunaj tempoj. Por ni kristanoj estas tiel, kiel por la popolo en Izrael: al la sperto de nia komuna savo apartenas la memoro esti fremdulo – en tiu senco ke ni fremdiĝas de Dio kaj de Lia lando. Tiu kristana formo de la rememoro havas etikan konsekvencon. Dio en Kristo restarigis nian indecon kaj faris nin civitanoj de sia lando; ne pere la bazo de nia servo, sed el amo, kiun Li donacas al ni sen kondiĉo. Li invitis nin, tiel fari, kiel Li: ne meti kondiĉojn, nur ami unu la alian. La kristana amo signifas: tiel ami kiel la Patro, la indecon rekoni, doni indecon kaj per tio porti sanon por la „rompita“/ malsana homaro.

### **Preĝo**

Eterna Dio,  
vi apartenas al nenia kulturo kaj al nenia lando,  
sed Vi estas la Sinjoro, kiu regas ĉion.  
Vi invitas nin, ke ni akceptu la fremdulojn inter ni.

Helpu nin per la Sankta Spirito,  
ke ni vivu kiel gefratoj,  
ke ĉiun homon akceptu gastamo, en Via nomo,  
kaj ni restu en la justeco de Via lando.  
Tion ni petas en la nomo de Jesuo.  
Amen.

*La dekstra mano de Dio  
rigardu en nia lando,  
rigardu la liberecon, esperon kaj amon.  
En nia kolora lando  
kunligu nin la kateno de la paco  
kaj ni unuiĝu per la dekstra mano de Dio.*

## Tago 2-a: Ne plu sklavo, sed kara frato

### Legaĵoj

*Unua legaĵo: Gen 1, 26-28 Ni kreu homon: [...] laŭ nia bildo*

Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin. Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj en la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero.

*Psalmo: 10, 1-10 Kial, ho Eternulo, Vi staras malproksime?*

Kial, ho Eternulo, Vi staras malproksime?  
Kial Vi kaŝas Vin en la tempo de la mizero?  
Pro la malhumileco de malbonulo suferas malriĉulo;  
Ili kaptiĝu per la artifikoj, kiujn ili elpensis.  
Ĉar malbonulo fanfaronas pri la kapricoj de sia animo;  
Rabanto forlasas, malŝatas la Eternulon.  
Malpiulo en sia malhumileco ne esploras;  
En ĉiuj liaj pensoj Dio ne ekzistas.  
Li ĉiam iras forte laŭ siaj vojoj;  
Viaj juĝoj estas tro alte super li;  
Ĉiujn siajn malamikojn li forspitas.  
Li diris en sia koro: Mi ne ŝanceliĝos,  
De generacio al generacio neniam estos al mi malbone.  
Lia buŝo estas plena de malbenado, trompo, kaj malico;  
Sub lia lango estas suferigo kaj malvero.  
Inside li sidas en la vilaĝoj;  
Kaŝe li mortigas senkulpulon;  
Liaj okuloj spionas malriĉulon.  
Li sidas inside en kaŝita loko, kiel leono en la kaverno;  
Li insidas, por kapti malriĉulon;  
Kaj li kaptas malriĉulon, tirante lin en sian reton.  
Li insidas, alpremiĝas,  
Kaj la malriĉulo falas en liajn fortajn ungegojn.

*Dua legaĵo: Fil 8-19 Akceptu lin jam ne kiel sklavon, sed kiel pli bonan ol sklavo, kiel fraton amatan*

Kvankam do mi havas plenan kuraĝon en Kristo, por ordoni al vi tion, kio estas konvena, tamen pro la amo mi preferas petegi tia, kia mi estas, Paŭlo, maljunulo kaj nun ankaŭ malliberulo pro Kristo Jesuo.

*Evangelio: Luk 10, 25-37 La parabolo de la bona samariano*

Kaj jen unu leĝisto stariĝis, kaj tentis lin, dirante: Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon? Kaj li diris al li: Kio estas skribita en la leĝo? kiel vi legas? Kaj li responde diris: Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto kaj per via tuta menso, kaj vian proksimulon kiel vin mem. Kaj li diris al li: Vi prave respondis; tion faru, kaj vi vivos. Sed li, dezirante pravigi sin, diris al Jesuo: Kaj kiu estas mia proksimulo? Jesuo respondis kaj diris: Unu homo malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo; kaj li falis en la manojn de rabistoj, kiuj lin senvestigis kaj batis, kaj foriris, lasante lin duone senviva. Kaj laŭ okazo unu pastro malsupreniris la saman vojon; kaj lin vidinte, li preterpasis aliflanke. Kaj tiel same unu Levito, veninte al la loko kaj lin vidinte, preterpasis aliflanke. Sed unu Samariano, vojaĝante, alvenis tien, kie li estis, kaj lin ekvidinte, li kortuŝiĝis, kaj alproksimiĝis, kaj bandaĝis liajn vundojn, kaj surverŝis oleon kaj vinon; kaj li metis lin

sur sian beston, kaj kondukis lin al gastejo, kaj zorgis pri li. Kaj la morgaŭan tagon li elprenis du denarojn kaj donis ilin al la gastejestro, kaj diris: Zorgu pri li, kaj kion pli vi elspozos, mi tion repagos al vi, kiam mi revenos. Kiu el tiuj tri, laŭ via opinio, sin montris proksimulo de tiu, kiu falis en la manojn de la rabistoj? Kaj li diris: Tiu, kiu faris al li kompaton. Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman.

\*

*Ŝakrado de homoj estas formo de sklaveco en la nuntempo. Pere de ĝi, oni trompas aŭ devigas viktimojn al sekslaboraĵoj, al infanlaboraĵoj kaj al la donado de siaj organoj je profito de la ekspluatistoj. Ĝi estas monda kaj multmilionda industrio. Estas ankaŭ kreskanta problemo en la kariba regiono. La reformitaj eklezioj de la kariba regiono unuigis siajn klopodojn kune kun la "Consejo para la Misión Mundial" (Konsilio por la Monda Misio) kaj la "Consejo para la Misión de América del Norte y el Caribe" (Konsilio por la Nordamerika kaj Kariba Misio) por eduki la kristanajn komunumojn kaj ĉesigi la plagon provokitan de ŝakrado de homoj.*

### **Komento**

Unu el la unuaj aferoj, kiujn ni lernas pri Dio en la Hebrea kaj Kristana Biblio estas, ke Dio kreis homon laŭ sia bildo. Tamen, ĉi tiu profunda kaj belega vero, estis ofte malheligita aŭ malakceptita laŭlonge de la homara historio. En la Romia Imperio, ekzemple, oni malakceptis la dignon de tiuj kiuj estis sklavoj. La mesaĝo de la evangelio estas tute malsama. Jesuo defiis la sociajn normojn, kiuj subtaksis la homan dignon de la samarianoj, montrante la samarianon kiel proksimulon de tiu kiu estis agresita dum sia vojo al Jeriĥo - proksimulo kiu devas esti amata, laŭleĝe-. Kaj Paŭlo, kuraĝulo pere de Kristo, parolas pri sklavo Onesimo kvazaŭ "tre amata frato", malobservante la sociajn normojn de sia epoko kaj substrekante la homecon de Onesimo. La kristana amo ĉiam devas esti kuraĝa amo. kiu kuraĝas transpasi limojn, agnoskante en la aliuloj la saman dignon, kiun ni posedas.

Kiel Sankta Paŭlo, la kristanoj devas esti "sufiĉe kuraĝaj pere de Kristo" por levi voĉon unuanime, kiu klare agnosku kiel gefratojn kaj proksimulojn tre amatajn, la viktimojn de homa ŝakrado, kaj tiel, labori kune por ĉesigi la sklavecon en la modernaj tempoj.

### **Preĝo:**

Mizerikorda Dio,

Vi montras vian proksimecon al tiuj, kiuj estas viktimoj de homa ŝakrado, certigante ilin, ke Vi konas iliajn situaciojn, kaj ke Vi aŭskultas iliajn kriojn. Ke via eklezio, tenante sin unuiĝinta, povu batali per kompatemo kaj kuraĝo por ke alvenu tiun tagon en kiu neniu estu ekspluatata kaj ĉiuj povu esti liberaj por vivi pace siajn dignajn vivojn.

Tion ĉi petas ni nome de la Triunua Dio, kiu povas igi senfine pli ol tio, kion ni povas peti aŭ imagi. Amen.

*La dekstra de Dio estas levita en nia lando*

*Levanta unuope la falintojn;*

*Ĉiuj estas konata per siaj nomoj*

*Kaj nun savataj de la honto,*

*Per la leviĝo de la dekstra de Dio.*

### **Tago 3-a: Via korpo estas templo de la Sankta Spirito**

#### **Legaĵoj**

*Unua legaĵo: Eli 3, 4-10 Dio liberigas la malliberulojn*

La Eternulo vidis, ke li iras, por rigardi, kaj Dio vokis al li el la mezo de la arbeto, kaj diris: Moseo, Moseo! Kaj tiu diris: Jen mi estas. Kaj Li diris: Ne alproksimiĝu ĉi tien; deprenu viajn ŝuojn de viaj piedoj, ĉar la loko, sur kiu vi staras, estas tero sankta. Ankoraŭ Li diris: Mi estas la Dio de via patro, la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la Dio de Jakob. Kaj Moseo kovris sian vizaĝon, ĉar li timis rigardi Dion. Kaj la Eternulo diris: Mi vidis la mizeron de Mia popolo, kiu estas en Egiptujo, kaj Mi aŭdis ĝian kriadon kaŭze de ĝiaj premantoj; Mi scias ĝiajn suferojn. Kaj Mi malsupren-iris, por savi ĝin el la manoj de la Egiptoj kaj elirigi ĝin el tiu lando en landon bonan kaj vastan, en landon, en kiu fluas lakto kaj mielo, sur la lokon de la Kanaanidoj kaj la Ĥetidoj kaj la Amoridoj kaj la Perizidoj kaj la Ĥividoj kaj la Jebusidoj. Nun la krioj de la Izraelidoj venis al Mi; kaj Mi vidis la turmentojn, per kiuj la Egiptoj turmentas ilin. Iru do, Mi sendos vin al Faraono, kaj elkonduku Mian popolon la Izraelidojn el Egiptujo.

*Psalmo: 24, 1-6 Sinjoro, ni estas tiuj, kiuj serĉas vian vizaĝon*

Al la Eternulo apartenas la tero, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,  
La mondo kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj.  
Ĉar Li sur la maroj ĝin fondis  
Kaj sur la akvoj ĝin fortikigis.

Kiu supreniros sur la monton de la Eternulo?  
Kaj kiu staros ĉe Lia sankta loko?  
Tiu, kiu havas purajn manojn kaj senmakulan koron,  
Kiu ne fordonis sian animon al malvero  
Kaj ne ĵuras trompe.

Li ricevos benon de la Eternulo,  
Kaj bonfarojn de Dio, lia savanto.  
Tio estas la gento de Liaj adorantoj,  
De la serĉantoj de Via vizaĝo, ho Dio de Jakob.

*Dua legaĵo: 1 Kor 6, 9-20 Gloru do Dion per via korpo*

Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio. Kaj tiaj estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis, sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio. Ĉio estas por mi permesata, sed ne ĉio estas oportuna. Ĉio estas por mi permesata; sed mi ne volas sub io submetiĝi. Manĝaĵoj por la ventro, kaj la ventro por manĝaĵoj; sed Dio neniigos kune ĝin kaj ilin. Sed la korpo estas ne por malĉasteco, sed por la Sinjoro; kaj la Sinjoro por la korpo; kaj Dio levis la Sinjoron, kaj levos ankaŭ nin per Sia potenco. Ĉu vi ne scias, ke viaj korpoj estas membroj de Kristo? ĉu mi do prenos la membrojn de Kristo, kaj faros ilin membroj de malĉastistino? Nepre ne! Aŭ ĉu vi ne scias, ke tiu, kiu kuniĝas kun malĉastistino, estas kun ŝi unu korpo? ĉar: Ili, Li diris, estos unu karno. Sed tiu, kiu kuniĝas kun la Sinjoro, estas kun li unu spirito. Forkuru de malĉasteco. Ĉiu peko, kiun homo faras, estas ekster la korpo; sed tiu, kiu malĉastas, pekas kontraŭ sia propra korpo. Aŭ ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu estas en vi kaj kiun vi havas de Dio? kaj vi ne apartenas al vi mem, ĉar vi estas aĉetitaj per prezo; gloru do Dion en via korpo.

*Evangelio: Mat 18, 1-7 Ve al la homo, per kiu la falilo venas!*

En tiu horo la disĉiploj venis al Jesuo, dirante: Kiu do estas la plej granda en la regno de la ĉielo? Kaj alvokinte al si infanon, li starigis ĝin meze de ili, kaj diris: Vere mi diras al vi: Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regnon de la ĉielo. Kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de la ĉielo. Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu

akceptas min; sed kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro. Ve al la mondo pro faliloj! ĉar estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas!

\*

*Multaj estas la kristanaj Eklezioj en Karibio, kiujn maltrankviligas la demando pri pornografio, ĉefe tiu, kiu cirkulas per interreto. Ĉi tiu havas konsekvencojn pereigajn por la homa digno, ĉefe tiu de la infanoj kaj junuloj. Kiel la sklavigo, ĝi ŝanĝas la homoj en varojn, enkaptas tiujn, kiuj fariĝas dependaj de ĝi, kaj koruptas ĉiun sanan rilaton de amo.*

### **Komento**

La libro Eliro montras la zorgon de Dio por sklavigitaj homoj. La manifestiĝo de Dio al Moseo en la brulanta arbeto estas potenca deklaro de lia volo liberigi sian popolon. Dio vidis ilian mizeron, aŭdis ilian plendon kaj venis por ilin liberigi. Ankoraŭ hodiaŭ, Dio aŭdas la plendon de tiuj, kiuj estas sklavoj, kaj volas ilin liberigi.

Ĉar sekseco estas donaco de Dio por interhomaj rilatoj kaj la esprimo de intimeco, la misuzo de ĉi tiu donaco tra pornografio sklavigas kaj senvalorigas samtempe tiujn, kiuj partoprenas en ĝia produkto kaj tiujn, kiuj ĝin konsumas.

Dio ne estas indiferenta kontraŭ ilia mizero, kaj la kristanoj estas vokataj sammaniere zorgi pri ili.

Sankta Paŭlo skribis, ke ni estas vokataj glori Dion per niaj korpoj, tio signifas, ke ĉio en niaj vivoj, eĉ niaj rilatoj, povas kaj devas esti agrabla ofero al Dio.

La kristanoj devas kune labori por konstrui tipon de socio, kiu defendu la dignon de la homo, kaj kiu metu neniun obstaklon antaŭ la etuloj de Dio, sed male kapabligu ilin vivi en la libero, kion Dio volas por ili.

### **Preĝo**

Per via ĉiela graco, ho Dio,  
Renovigu nin korpe kaj mense,  
Kreu en ni puran koron kaj puran menson  
Por ke ni povu glori vian nomon.

Faru, ke la Eklezioj atingu unuecon de celoj  
Por ke via popolo sanktiĝu  
Per Jesuo Kristo  
Kiu vivas kaj regnas kun vi  
En la unueco de la Sankta Spirito  
En ĉiuj jarcentoj.

*La dekstra mano de Dio  
Kuracas en nia lando,  
Sanigante rompitaĵajn korpojn, mensojn kaj animojn;  
Tiel mirinda estas ĝia tuŝo,  
Kun amo, kiu havas tiel grandan signifon,  
Kiam ni estas resanigitaj  
Per la dekstra mano de Dio.*

## Tago 4-a: Espero kaj saviĝo

### Legajtoj

*Unua legaĵo: Jes 9, 2-7a Por pligrandigi la regadon kaj por paco senfina*

Popolo, kiu iris en mallumo, ekvidis grandan lumon; super homoj, sidantaj en lando de morta ombro, ekbrilis lumo. Vi multigis la popolon, Vi grandigis ĝian ĝojon; ili ĝojas antaŭ Vi, kiel oni ĝojas dum la rikolto, kiel oni ĝojas ĉe dividado de rabakiro. Ĉar la jugon de ilia ŝarĝo, la kanon de ilia ŝultro, kaj la bastonon de ilia premanto Vi rompis, kiel en la tempo de Midjan. Ĉar ĉiu armaĵo de tiuj, kiuj sin brue armis, kaj la vestoj, kiuj ruliĝis en sango, estos forbruligitaj, ekstermitaj per fajro. Ĉar infano naskiĝis al ni, filo estas donita al ni, kaj la regado estos sur lia ŝultro, kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco, Princo de Paco; por pligrandigi la regadon kaj por paco senfina sur la trono de David kaj en lia regno.

*Psalmo: 34,1-15 Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin*

Mi gloros la Eternulon en ĉiu tempo;  
Ĉiam laŭdo por Li estos en mia buŝo.  
Per la Eternulo gloriĝas mia animo;  
La humiluloj aŭdu kaj ĝoju.

Gloru la Eternulon kun mi,  
Kaj ni altigu kune Lian nomon.  
Mi serĉis la Eternulon, kaj Li respondis al mi,  
Kaj de ĉiuj miaj danĝeroj Li savis min.

Kiuj rigardas al Li, ricevas lumon,  
Kaj ilia vizaĝo ne kovriĝos per honto.  
Jen ĉi tiu mizerulo vokis, kaj la Eternulo aŭdis,  
Kaj de ĉiuj liaj mizeroj Li savis lin.

Anĝelo de la Eternulo postenas ĉirkaŭ tiuj, kiuj Lin timas,  
Kaj Li ilin savas.

Provu kaj vidu, kiel bona estas la Eternulo;  
Feliĉa estas la homo, kiu Lin fidas.  
Timu la Eternulon, Liaj sanktuloj;  
Ĉar nenio mankas al tiuj, kiuj Lin timas.

Leonidoj estas senhavaj kaj malsataj;  
Sed kiuj serĉas la Eternulon, tiuj havas mankon en nenia bono.  
Venu, infanoj, aŭskultu min;  
Pri timo antaŭ la Eternulo mi vin instruos.

Kiu ajn vi estas, homo,  
Kiu deziras vivon kaj amas multajn kaj bonajn tagojn:  
Gardu vian langon kontraŭ malbono,  
Kaj vian buŝon kontraŭ mensoga parolo;  
Dekliniĝu de malbono kaj faru bonon,  
Serĉu pacon kaj ĉasu ĝin.

*Dua legaĵo: Apo 7, 13-17 Kaj Dio forviŝos de iliaj okuloj ĉiun larmon*

Kaj respondis unu el la presbiteroj, dirante al mi: Kiuj estas ĉi tiuj per blankaj roboj vestitaj, kaj de kie ili venis? Kaj mi diris al li: Mia sinjoro, vi scias. Kaj li diris al mi: Ĉi tiuj estas la venantoj el la granda afliktado, kaj ili lavis siajn robojn, kaj blankigis ilin en la sango de la Ŝafido. Tial ili estas antaŭ la trono de Dio; kaj ili servas al Li tage kaj nokte en Lia templo; kaj la Sidanto sur la trono etendos super ili Sian tabernaklon. Ili ne plu malsatos, nek plu soifos; ne frapos ilin la suno nek ia varmego; ĉar la Ŝafido, kiu estas meze de la trono, paŝtos ilin kaj kondukos ilin al akvofontoj de vivo; kaj Dio forviŝos de iliaj okuloj ĉiun larmon.

*Evangelio: Joh 14, 25-27 Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi*

Tion mi parolis al vi, dum mi ĉe vi restas. Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi. Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas, mi donas al vi. Ne maltrankviliĝu via koro, nek senkuraĝiĝu.

\*

*La perforto en Karibio estas problemo, kiu pridemandas la ekleziojn. Ekzistas alarma kvanto da murdoj, multaj el kiuj rilatas al enhejma perforto kaj luktoj inter bandaĉoj; ankaŭ al aliaj krimaj manifestiĝoj. Ankaŭ estas kreskanta kvanto da memlezado kaj memmortigo el kelkaj zonoj de la regiono.*

### **Komento**

La Regno de Dio promesita, la Regno kiun Jesuo anoncis kaj estigis per sia agado, estas Regno de justico, paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito. Kion signifas tiu bona novaĵo por tiuj, kiu estas enkapitaj en la tenebroj de perforto? En la vizio de la profeto, brila lumo kovris tiujn, kiuj loĝadis en tenebrando. Sed, kiel kristanoj povus porti la lumon de Jesuo al tiuj, kiuj baraktas en la tenebroj de enhejma perforto kaj bandaĉoj? Kian esperon povas oferi la kristanoj? Malĝojige estas, ke la dispartigo inter kristanoj malfaciligas komuniki esperon. Tamen, la serĉado de la paco kaj kunfratiĝo inter la diversaj eklezioj kaj konfesioj estas la malo de tio. Kiam kristanoj strebas atingi unuecon en mondo signita de konfliktoj, ili oferas a la mondo signon je repaciĝo. La kristanoj, kiuj rifuzas eniri logikon je privilegioj kaj statusoj, kaj ne akceptas la senvalorigon de aliuloj kaj ties komunumoj, estas atestantoj je la paco de la Dia Regno, kie la Ŝafido gvidas la santulojn al vivaj akvofontoj. Tiu ĉi estas la paco, kiun la mondo bezonas, tiu kiu alportas resaniĝon kaj konsolon al la afliktitoj de perforto.

### **Preĝo**

Dio je ĉia konsolo kaj espero,  
Via reviviĝo venkis la perforton de la Kruco.  
Permesu, ke kiel popolo Via  
ni povu esti videbla signo  
pri tio, ke la ĉi-monda perforto estos venkita.  
Tion ni petas je la nomo de la Sinjoro Resurektinta.  
Amen.

*La Dia dekstra mano  
montras en nia lando,  
montras la vojon sekvendan;  
tiom malluma estas la vojo  
kaj tiel facile ni devojiĝas,  
sed ni estas kondukitaj de la Dia dekstra mano.*

## Tago 5-a: De unu parto al alia de la lando, mi aŭdas la krion de la filino de mia popolo

### Legajoj

*Unua legaĵo: Readmono 1, 19-35 La Eternulo mem, via Dio, kiu iras antaŭ vi kaj portis vin*

Kaj ni foriris de Ĥoreb, kaj trairis tiun tutan grandan kaj teruran dezerton, kiun vi vidis, sur la vojo al la monto de la Amoridoj, kiel ordonis al ni la Eternulo, nia Dio; kaj ni venis al Kadeŝ-Barnea. Kaj mi diris al vi: Vi venis al la monto de la Amoridoj, kiun la Eternulo, nia Dio, donas al ni; vidu, la Eternulo, via Dio, donas al vi la landon; iru, ekposedu ĝin, kiel diris al vi la Eternulo, la Dio de viaj patroj; ne timu kaj ne tremu. Sed vi ĉiuj aliris al mi, kaj diris: Ni sendu antaŭ ni virojn, ke ili esploru por ni la landon, kaj alportu al ni sciigon pri la vojo, per kiu ni devas iri, kaj pri la urboj, al kiuj ni devas veni. Kaj tio plaĉis al mi, kaj mi prenis el vi dek du virojn, po unu viro el tribo; kaj ili iris kaj supreniris sur la monton, kaj venis al la valo Eŝkol kaj esplorigardis ĝin. Kaj ili prenis en siajn manojn iom el la fruktoj de la lando kaj liveris al ni, kaj alportis al ni sciigon, kaj diris: Bona estas la lando, kiun la Eternulo, nia Dio, donas al ni. Sed vi ne volis iri, kaj vi malobeis la vortojn de la Eternulo, via Dio; kaj vi murmuris en viaj tendoj, kaj diris: Pro la malamo de la Eternulo kontraŭ ni, Li elkondukis nin el la lando Egipta, por transdoni nin en la manon de la Amoridoj, por ke ili ekstermu nin; kien ni iru? Niaj fratoj ektimigis nian koron, dirante: La popolo estas pli granda kaj pli altkreska ol ni, la urboj estas grandaj kaj fortikigitaj ĝis la ĉielo, kaj ankaŭ Anakidojn ni tie vidis. Kaj mi diris al vi: Ne tremu kaj ne timu ilin; la Eternulo via Dio, kiu iras antaŭ vi, Li batalos por vi, simile al ĉio, kion Li faris por vi en Egiptujo antaŭ viaj okuloj, kaj en la dezerto, kie, kiel vi vidis, la Eternulo, via Dio, portis vin, kiel homo portas sian filon, sur la tuta vojo, kiun vi iris, ĝis vi venis al ĉi tiu loko. Sed eĉ ĉe tio vi ne fidis la Eternulon, vian Dion, kiu iras antaŭ vi sur la vojo, por serĉi por vi lokon, kie vi povus halti tendare, nokte en fajro, por montri al vi la vojon, kiun vi devas iri, kaj tage en nubo. Kaj la Eternulo aŭdis viaj vortojn, kaj Li ekkoleris kaj ĵuris, dirante: Neniu el ĉi tiuj homoj, el ĉi tiu malbona generacio, vidos la bonan landon, kiun Mi ĵuris doni al viaj patroj.

*Psalmo: 145, 9-20 La Eternulo subtenas ĉiujn falantojn*

La Eternulo estas bona por ĉiuj;  
Lia favorkoreco estas super ĉiuj Liaj kreitaĵoj.  
Gloros Vin, ho Eternulo, ĉiuj Viaj kreitaĵoj,  
Kaj Viaj fideluloj Vin benos.

Ili raportos pri la gloro de Via regno  
Kaj parolos pri Via potenco,  
Por sciigi al la homidoj Lian potencon  
Kaj la majestatan gloron de Lia regno.

Via reĝeco estas reĝeco eterna,  
Kaj Via regado estas por ĉiuj generacioj.  
La Eternulo subtenas ĉiujn falantojn  
Kaj restarigas ĉiujn kurbigitojn.

Ĉies okuloj estas turnitaj al Vi,  
Kaj Vi donas al ili ilian manĝon en ĝia tempo.  
Vi malfermas Vian manon  
Kaj satigas favore ĉion vivantan.

Justa estas la Eternulo en ĉiuj Siaj vojoj  
Kaj bona en ĉiuj Siaj faroj.  
Proksima estas la Eternulo por ĉiuj, kiuj Lin vokas,  
Por ĉiuj, kiuj vokas Lin sincere.

La deziron de Siaj respektantoj Li plenumas,  
Kaj ilian krion Li aŭdas kaj helpas ilin.  
La Eternulo gardas ĉiujn Siajn amantojn,  
Kaj ĉiujn malvirtulojn Li ekstermas.



*Dua legaĵo: Jak 1, 9-11 Riĉulo kiel floro de herbo forpasos*

Sed la malaltranga frato ĝoju pri sia alteco; kaj la riĉulo pri sia humiliĝo; ĉar kiel floro de herbo li forpasos. Ĉar la suno leviĝas kun la brulvento kaj sekigas la herbon, kaj ĝia floro falas, kaj la gracio de ĝia formo pereas; tiel ankaŭ la riĉulo velkos en siaj vojoj.

*Luko 18, 35-43 Jesuo, Filo de David, kompatu min!*

Kaj kiam li alproksimiĝis al Jeriĥo, unu blindulo sidis apud la vojo, petante almozojn; kaj aŭdinte homamason preterirantan, li demandis, kio estas tio. Kaj oni diris al li, ke Jesuo, la Nazaretano, preteriras. Kaj li kriis, dirante: Jesuo, filo de David, kompatu min. Kaj la antaŭirantoj admonis lin, ke li silentu; sed li des pli forte kriis: Ho filo de David, kompatu min! Kaj Jesuo haltis, kaj ordonis alkonduki lin; kaj kiam li alproksimiĝis, li lin demandis: Kion vi volas, ke mi faru al vi? Kaj li diris: Sinjoro, ke mi ricevu vidpovon. Kaj Jesuo diris al li: Ricevu vidpovon; via fido vin savis. Kaj li tuj ricevis vidpovon, kaj sekvis lin, glorante Dion; kaj la tuta popolo, vidinte tion, donis laŭdon al Dio.

\*

*La ekonomio de Kariboj ĉiam estis bazata sur la produktado de kruda materialo por la eŭropaj merkatoj, pro tio ĝi neniam povis memsubteni sin. Sekve de tio, la internacia financa prunto fariĝis tre grava por la ekonomia evoluo. La peto de tiu prunto trudis redukton de la elspezoj de veturiloj, de instruado, de sano kaj de aliaj publikaj servoj, ĉio tio havas konsekvencojn pli pezajn sur la malriĉuloj. La Konferenco de karibaj eklezioj lanĉis iniciaton por alfronti la nunan krizon de la publika ŝuldo en nia regiono, por helpi al la malriĉuloj pere de internaciaj retoj de monsubteno.*

### **Komento**

Ni povas imagi la bruon de la homamaso, kiam Jesuo eniras en Jeriĥon. Multaj voĉoj silentis je la krio de la blinda almozo. Li estas fonto de malatento kaj embaraso. Sed ankaŭ en la tumulto Jesuo aŭdas la voĉon de la blindulo, samkiel Dio ĉiam aŭskultas la krion de la malriĉuloj en la hebreaj Skriboj. La Sinjoro, kiu relevas la falanton, ne nur aŭskultas sed respondas, tial komplete transformas la vivon de la blinda almozo.

La malunuiĝo inter la kristanoj povas fariĝi parto de la tumulto de la mondo kaj de la kaoso. Same kiel la svarmaj voĉoj ekster Jeriĥo, nia disdivido povas elstari super la krio de la malriĉuloj. Tamen, kiam ni estas unuigintaj, ni fariĝas ĉiam pli plene ĉeesto de Kristo en la mondo, pli kapablaj aŭdi, aŭskulti kaj respondi. Anstataŭ plialtigi la kvanton de malkonkordoj, ni kune kapablas pli bone aŭdi la voĉojn kaj distingi tiujn, kiuj pli bezonas aŭskultadon.

### **Preĝo**

Ho Dio de amo,  
Vi relevas la malriĉulojn kaj la subprematojn  
kaj redonas dignon al ili.

Aŭskultu nun nian krion por la malriĉuloj de nia mondo,  
redonu esperon kaj konsolon al ili  
tiel ke via tuta popolo estu unu.  
Ni preĝas al Vi je la nomo de Jesuo.  
Amen.

*La dekstra mano de Dio  
subtenas la teron;  
ĝi relevas tiun, kiu falas, unuope.  
Ĉiu estas konata laŭnome  
kaj savita de la honto  
ĉar la mano de Dio leviĝis.*

## Tago 6-a: Atentu la aferojn de aliaj

### Legaĵoj

*Unua legaĵo: Jes 25, 1-9 Ni ĝoju kaj estu gajaj pro Lia savo*

Ho Eternulo, Vi estas mia Dio; mi gloros Vin, mi laŭdos Vian nomon; ĉar Vi faris miraklon; decidoj antikvaj fariĝis efektivaĵoj kaj veraĵoj. Ĉar Vi faris el urbo amason da ŝtonoj; urbon fortikigitan Vi faris ruino; la kasteloj de la barbaroj ne plu prezentas urbon kaj neniam rekonstruiĝos. Pro tio gloros Vin popolo potenca, urbo de fortaj gentoj Vin timos. Ĉar Vi fariĝis fortikaĵo por senhavulo, fortikaĵo por malriĉulo en lia mizero, rifuĝejo kontraŭ pluvego, ombro kontraŭ varmego; ĉar la spirito de potenculoj estas kiel pluvego kontraŭ muron. Kiel varmegon en dezerto Vi kvietigis la malhumilecon de la barbaroj; kiel varmego per ombro de nubo estas mallaŭtigita la kantado de la potenculoj. Kaj la Eternulo Cebaot faros por ĉiuj popoloj sur tiu monto festenon el grasaĵoj, festenon el bona vino, el grasaĵoj sukoplenaj, el vinoj ne fermentintaj. Kaj Li forigos sur tiu monto la kovrilon, kiu kovras ĉiujn popolojn, kaj la kurtenon, kiu estas etendita super ĉiuj gentoj. Li neniigos la morton por ĉiam; kaj la Sinjoro, la Eternulo, forviŝos la larmojn de ĉiuj vizaĝoj, kaj la honton de Sia popolo Li forigos de la tuta tero; ĉar la Eternulo tion diris. Kaj oni diros en tiu tago: Jen estas nia Dio, al kiu ni esperis, kaj Li nin savis; jen estas la Eternulo, al kiu ni esperis, ni ĝoju kaj estu gajaj pro Lia savo.

*Psalmo: 82, 1-8 Defendu malriĉulon kaj mizerulon*

Dio stariĝis en Dia anaro;  
Inter la dioj Li juĝas.

Ĝis kiam vi juĝos maljuste,  
Kaj privilegios la personojn de malvirtuloj?  
Estu justaj al malriĉulo kaj orfo;  
Rilate afliktiton kaj senhavulon estu virtaj.  
Liberigu malriĉulon kaj mizerulon;  
El la mano de malvirtulo ilin savu.

Ili ne scias kaj ne komprenas,  
En mallumo ili marŝas;  
Ekŝanceliĝis ĉiuj fundamentoj de la tero.

Mi diris: Vi estas dioj,  
Kaj ĉiuj vi estas filoj de la Plejaltulo;  
Sed vi mortas, kiel homoj,  
Kaj vi falos, kiel ĉiu el la potenculoj.

Leviĝu, ho Dio, juĝu la teron;  
Ĉar Vi heredas ĉiujn popolojn.

*Dua legaĵo: Fil 2, 1-4 Ne atentu ĉiu siajn proprajn aferojn, sed ĉiu ankaŭ la aferojn de aliaj*

Se do en Kristo ekzistas ia konsolo, ia simpatio de amo, ia kunuleco de la Spirito, ia korfavoro kaj kompatato, plenigu mian ĝojon, ke vi tiel same sentu, havante la saman amon, estante unuanimaj, sampensaj, nenion farante malpace aŭ arogante, sed kun humileco rigardante unu la alian kiel pli indan, ol li mem; ne atentu ĉiu siajn proprajn aferojn, sed ĉiu ankaŭ la aferojn de aliaj.

*Evangelio: Luk 12, 13-21 Gardu vin kontraŭ ĉia avideco*

Kaj unu el la homamaso diris al li: Majstro, diru al mia frato, ke li dividu kun mi la heredaĵon. Sed li diris al li: Ho viro, kiu starigis min super vi kiel juĝanton aŭ dividanton? Kaj li diris al ili: Zorgu, kaj gardu vin kontraŭ ĉia avideco, ĉar la vivo de homo ne konsistas en la abundeco de liaj posedaĵoj. Kaj li parolis al ili parabolon, dirante: La bieno de unu riĉulo donis abunde; kaj li konsideris, dirante: Kion mi faru, ĉar mi ne havas lokon, kie mi povas amasigi miajn fruktojn? Kaj li diris: Jen kion mi faros: mi disbatos miajn grenejojn kaj konstruos pli grandajn, kaj tie mi amasigos mian grenon kaj miajn posedaĵojn. Kaj mi diros al mia animo: Animo, vi havas multajn posedaĵojn, provizitajn por multaj

jaroj; ripozu, manĝu, trinku, estu gaja. Sed Dio diris al li: Ho senprudentulo! ĉi tiun nokton oni postulas de vi vian animon; kies estos tio, kion vi preparis? Tia estas tiu, kiu kolektas por si trezoron, kaj ne estas riĉa rilate Dion.

\*

*La ŝanĝo de la internaciaj bankaj reguloj daŭre trafas malpozitive la merkaton kaj la komercon de Karibio, kaj minacas la ekonomian pluvivon de multaj familioj. Fariĝas ĉiam pli malfacile por la kariba loĝantaro labori en eksterlando por sendi monon al siaj familioj. La Eklezioj de Karibio enkondukis la movadon „Credit Union”, por ebligi al la malriĉuloj la aliron al financoj por ekonomiaj agadoj.*

### **Komento**

La atesto de la Skriboj estas ĉiam kohereca: Dio montras preferon por la malriĉuloj: lia mano agas favore al la malriĉuloj kaj kontraŭ la potenculoj. En simila maniero, Jesuo konstante admonas kontraŭ la danĝero de avideco. Malgraŭ ĉi tiuj admonoj, tamen, la peko de avideco ofte infektas niajn kristanajn komunumojn, kaj enŝovas logikon de vetkonkuro, pro kiu unu komunumo rivalas kontraŭ alia. Ni devas memori, ke laŭmezure ke ni ne sukcesas diferencigi de la mondo, sed konformiĝas al ĝia disiga kaj konkurencema spirito, ni ne estas „fortikaĵo por malriĉulo en lia mizero, rifuĝejo kontraŭ pluvego”,

Esti riĉaj antaŭ Dio ne signifas, por niaj eklezioj kaj komunumoj, havi multajn fidelulojn, kiuj vizitas tiujn komunumojn aŭ monoferas al ili. Ĝi signifas, kontraŭe, rekoni ke kiel kristanoj ni havas senfinan nombron da fratoj kaj fratinoj en la mondo, unuiĝintaj ankaŭ meze de la ekonomiaj dividoj inter Nordo kaj Sudo. Konsciaj pri ĉi tiu frateco en Kristo, la kristanoj povas kunigi siajn manojn kaj kune antaŭenigi ekonomian justecon por ĉiuj.

### **Preĝo**

Ho Dio ĉiopova,  
donacu kuraĝon kaj forton al via Eklezio  
en la daŭrigo de la proklamo de justeco kaj rajto  
en situacioj de superregado kaj subpremo.

Faru, ke via Spirito helpu nin,  
dum ni celebras nian unuecon en Kristo,  
alrigardi la necesojn de la aliaj.  
Amen.

*La mano de Dio  
intervenadas sur la tero;  
ĝi forviŝas envion, malamon, koleron kaj avidon.  
Nia egoismo kaj nia trodeziro,  
nia orgojlo kaj niaj malbonaj faroj  
estas forbalaataj de la mano de Dio.*

## Tago 7-a: Konstrua familio en domo kaj preĝejo

### Legaĵoj

*Unua legaĵo: Eli 2: 1-10 La naskiĝo de Moseo*

Kaj iris unu homo el la domo de Levi kaj prenis edzinon Leviidinon. Kaj la virino gravediĝis, kaj naskis filon; kaj ŝi vidis, ke li estas bela, kaj ŝi kaŝis lin dum tri monatoj. Sed ŝi ne povis plu kaŝi lin, tial ŝi prenis por li keston el kanoj kaj ĉirkaŭŝmiris ĝin per asfalto kaj peĉo, kaj metis tien la infanon kaj metis ĝin inter la kanojn sur la bordo de la Rivero. Kaj lia fratino stariĝis malproksime, por sciiĝi, kio fariĝos kun li. Kaj la filino de Faraono malsupreniris, por lavi sin en la Rivero, kaj ŝiaj servantinoj iradis sur la bordo de la Rivero. Ŝi ekvidis la keston meze de la kanoj, kaj ŝi sendis sian sklavinon, ke ŝi ĝin prenu. Ŝi malfermis, kaj ekvidis la infanon; ĝi estis knabeto, kiu ploris. Kaj ŝi kompatis lin, kaj diris: Ĝi estas el la Hebreaj infanoj. Tiam lia fratino diris al la filino de Faraono: Ĉu mi iru kaj voku al vi virinon nutranton el la Hebreinoj, ke ŝi nutru por vi la infanon? Kaj la filino de Faraono diris al ŝi: Iru. Kaj la knabino iris kaj vokis la patrinon de la infano. Kaj la filino de Faraono diris al ŝi: Prenu ĉi tiun infanon kaj nutru ĝin por mi, kaj mi pagos al vi. Kaj la virino prenis la infanon kaj nutris ĝin. Kiam la infano grandiĝis, ŝi alportis lin al la filino de Faraono, kaj li fariĝis filo por ŝi, kaj ŝi donis al li la nomon Moseo, dirante: El la akvo mi lin elteris.

*Psalmo 127 Se la Eternulo ne konstruas la domon, tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj*

Se la Eternulo ne konstruas la domon,  
Tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj;  
Se la Eternulo ne gardas urbon,  
Tiam vane maldormas la gardanto.

Vane vi frue leviĝas, malfrue sidas,  
Manĝas panon kun klopodoj:  
Al Sia amato Li donas en dormo.  
Jen, heredo de la Eternulo estas infanoj;  
Rekompenco estas la frukto de ventro.

Kiel sagoj en la mano de fortulo,  
Tiel estas junaj filoj.  
Bone estas al la homo, kiu plenigis per ili sian sagujon;  
Ili ne estos hontigitaj,  
Kiam ili parolos kun la malamikoj ĉe la pordego.

*Dua legaĵo: Heb11, 23-24 Moseo estis kaŝita de siaj gepatroj ... Ĉar ili vidim, ke la infano estis bela*

Per la fido Moseo, naskiĝinte, estis kaŝata tri monatojn de la gepatroj, ĉar ili vidis la infaneton belega, kaj ne timis la dekreton de la reĝo. Per la fido Moseo, plenkreskinte, rifuzis esti nomata filo de filino de Faraono.

*Evangelio: Mat 2, 13-15 Jozefo vekigis, kaj prenis la knabeton kaj sian patrinon nokte, kaj iris Egiptujon*

Kaj post ilia foriro jen anĝelo de la Eternulo aperis en sonĝo al Jozef, dirante: Leviĝu, kaj prenu la knabeton kaj lian patrinon, kaj forrapidu en Egiptujon, kaj restu tie, ĝis mi parolos al vi; ĉar Herodo serĉos la knabeton, por lin pereigi. Kaj li leviĝis, kaj prenis la knabeton kaj lian patrinon nokte, kaj migris en Egiptujon, kaj restis tie ĝis la morto de Herodo; por ke plenumiĝu tio, kion la Eternulo parolis per la profeto, dirante: El Egiptujo Mi vokis Mian filon.

\*

*En Karibio la familio daŭre malhelpas la heredaĵon de sklaveco kaj de novaj faktoroj kiel la migrado de gepatroj, financaj problemoj kaj hejma perforto. Fronte al ĉi tiu realaĵo, la preĝejoj de Karibio laboras por doni subtenon al ambaŭ nukleaj kaj plivastigitaj familioj.*

## **Komento**

Familio estas grava por protektado kaj nutrado de infanoj. La Biblio rakontas pri la misfunkciadoj de Moseo kaj Jesuo, kiuj estis en morta danĝero de la momento, kiam ili naskiĝis pro la murdaj ordonoj de koleraĵ regantoj, ilustras, kiel vundeblaj infanoj povas esti al eksteraj fortoj. Ĉi tiuj rakontoj ankaŭ montras, kiel agon oni povas fari por protekti tiajn malgrandulojn. Mateo prezentas al ni modelon de patreco, kiu estas en amanta fideleco al la ordono de la Sinjoro, precipe en tumultoj.

La Skriboj rigardas infanojn kiel benon kaj kiel espero por la estonteco. Por la Psalmisto, ili estas kiel „sagoj en la mano de militisto“. Kiel kristanoj ni dividas komunan vokon vivi kiel subtenaj familiaj retoj, dependante de la forto de la Sinjoro kaj konstruante fortajn komunumojn kiuj ebligas al la infanoj sekuran kreskon.

## **Preĝo**

Dio Gracema,

Vi sendis vian filon naskiĝi en ordinara familio  
kun prapatroj, kiuj estis ambaŭ fidelaj kaj pekemaj.

Ni petas vian benon al ĉiuj familioj  
ene de domoj kaj komunumoj.

Ni preĝas precipe por la unueco de la kristana familio  
por ke la mondo povu kredi.

En la nomo de Jesuo ni preĝas,

Amen.

*La dekstra mano de Dio*

*skribas en nia lando,*

*skribante kun potenco kaj kun amo;*

*niaj konfliktoj kaj niaj timoj,*

*niaj triumfoj kaj niaj larmoj,*

*estas registritaj per la dekstra mano de Dio.*

## **Tago 8-a: Li kolektos la disvastigitan ... de la kvar anguloj de la tero**

### **Legaĵoj**

*Unua legaĵo: Jes 11,12-13 Efraimo ne envios Jehudan, kaj Jehuda ne premos Efraimon*

Kaj Li levos standardon inter la nacioj kaj kolektos la dispelitojn de Izrael, kaj la disŝetitojn de Jehuda Li kolektos de la kvar finoj de la tero. Kaj malaperos la envio kontraŭ Efraimon, kaj la premantoj de Jehuda ekstermiĝos; Efraimo ne envios Jehudan, kaj Jehuda ne premos Efraimon.

*Psalmo: 106, 1-14, 43-48 Kunvenigu nin por danki Vian sanktan nomon*

Gloru la Eternulon, ĉar Li estas bona;  
Ĉar eterna estas Lia boneco.  
Kiu eldiros la potencon de la Eternulo,  
Aŭdigos Lian tutan gloron?  
Bone estas al tiuj, kiuj observas justecon,  
Kiuj agas bone en ĉiu tempo.

Memoru min, ho Eternulo, pro favoro al Via popolo;  
Sendu al mi Vian savon,  
Por ke mi vidu la bonstaton de Viaj elektitoj,  
Por ke mi ĝoju kun la ĝojo de Via popolo,  
Por ke mi triumfu kun Via heredo.

Ni pekis kune kun niaj patroj,  
Ni malbonagis, ni malvirtis.  
Niaj patroj en Egiptujo ne komprenis Viajn miraklojn,  
Ne memoris Vian grandan bonecon;  
Kaj ili ribelis apud la maro, apud la Ruĝa Maro.

Sed Li savis ilin pro Sia nomo,  
Por montri Sian potencon.  
Kaj Li ekkriis al la Ruĝa Maro, kaj ĝi elsekiĝis;  
Kaj Li kondukis ilin tra la abismoj, kiel tra la dezerto.  
Kaj Li savis ilin el la mano de la malamanto,  
Kaj Li liberigis ilin el la mano de la malamiko.

Kaj la akvo kovris iliajn kontraŭulojn;  
Eĉ unu el ili ne restis.  
Tiam ili ekkredis al Liaj vortoj,  
Ili ekkantis Lian gloron.

Sed baldaŭ ili forgesis Liajn farojn,  
Ili ne fidis Lian konsilon.  
Ili fordonis sin al siaj kapricoj en la dezerto,  
Kaj ili incitis Dion en la stepo.

Multajn fojojn Li ilin savis;  
Sed ili ribeladis per siaj entreprenoj,  
Kaj ili senfortiĝis pro sia krimeco. –

Sed Li ekrigardis ilian suferon,  
Kiam Li aŭdis ilian kriadon;  
Kaj Li rememoris Sian interligon kun ili,  
Kaj Li ekbedaŭris laŭ Sia granda favorkoreco;  
Kaj Li aperigis kompaton por ili  
Ĉe ĉiuj iliaj malliberigintoj.

Savu nin, ho Eternulo, nia Dio,  
Kaj kolektu nin el inter la popoloj,

Por glori Vian sanktan nomon,  
Por triumfi pro Via gloro.  
Glorata estu la Eternulo, Dio de Izrael,  
de eterne ĝis eterne.  
Kaj la tuta popolo diru: Amen.

*Dua legaĵo: Efe 2,13-19 Li detruis la dividantan muron*

Sed nun en Kristo Jesuo vi, iam malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo. Ĉar nia paco estas li, kiu unuigis ambaŭ kaj rompis la intermuron de disigo, en sia karno neniiginte la malamon, la leĝon de ordonoj en dekretoj; por krei en si el la du unu novan homon, tiel farante pacon; kaj por kunakordigi ambaŭ en unu korpo al Dio per la kruco, mortiginte per tio la malamon; kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj; ĉar per li ni ambaŭ havas en unu Spirito alkondukon al la Patro. Sekve vi jam estas ne fremduloj kaj pas- loĝantoj, sed samregnanoj kun la sanktuloj, kaj el la domanaro de Dio.

*Evangelio: Joh 17, 1-12 Mi estis glorata en ili*

Tion Jesuo parolis; kaj levinte la okulojn al la ĉielo, li diris: Patro, la horo venis; glori Vian Filon, por ke la Filo Vin glori; kiel Vi donis al li aŭtoritaton super ĉiu karno, por ke li donu eternan vivon al ĉiuj tiuj, kiujn Vi donis al li. Kaj jen estas la eterna vivo, ke ili konu Vin, la sole veran Dion, kaj tiun, kiun Vi sendis, Jesuon Kriston. Mi gloris Vin sur la tero, plenuminte la faron, kiun Vi donis al mi por fari. Kaj nun, ho Patro, glori min kun Vi, per la gloro, kiun mi havis kun Vi, antaŭ ol la mondo ekzistis. Mi elmontris Vian nomon al la homoj, kiujn Vi donis al mi el la mondo; Viaj ili estis, kaj al mi Vi ilin donis; kaj ili konservis Vian vorton. Nun ili scias, ke ĉio ajn, kion Vi donis al mi, estas de Vi; ĉar mi donis al ili la vortojn, kiujn Vi donis al mi; kaj ili akceptis ilin, kaj scias vere, ke mi elvenis de Vi; kaj ili kredas, ke Vi min sendis. Mi preĝas por ili; mi preĝas ne por la mondo, sed por tiuj, kiujn Vi donis al mi, ĉar ili estas Viaj; kaj ĉio mia estas Via, kaj Via estas mia; kaj mi estas glorita per ili. Mi jam ne estas en la mondo, kaj ĉi tiuj estas en la mondo, kaj mi venas al Vi. Patro Sankta, gardu en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi, por ke ili estu unu tiel same, kiel ni. Dum mi estis kun ili, mi konservis en Via nomo tiujn, kiujn Vi donis al mi; kaj mi gardis ilin, kaj neniu el ili pereis, krom la filo de perdiĝo, por ke plenumiĝu la Skribo.

\*

*La karibaj Eklezioj laboras kune por resanigi la vundojn en la Korpo de Kristo en la regiono, kiuj estas heredaĵo forlasita de kolonigo. La repacigo ofte postulas penton, riparigon kaj resanigon de memoroj. Unu ekzemplo estas la agoj de ekskuzo kaj kompenso inter baptistoj en Britio kaj Karibio. Kiel Israelo, la Eklezio en sia unueco estas nomata kiel signo kaj aktiva agente de repaciĝo.*

## **Komento**

Laŭlonge de la biblia rakonto pri la savo-historio, nekonfuzebla motivo estas la malfrua determino de la Sinjoro por formi homojn, kiujn li povus nomi sian propran. La formado de tiaj homoj - kunigita en sankta interligo kun Dio - estas integra al la plano de savo de la Sinjoro kaj al la gloro kaj sankteco de la Nomo de Dio.

La profetoj ripete memorigas Israelon, ke la interligo postulis, ke rilatoj inter siaj diversaj sociaj grupoj estu karakterizitaj de justeco, kompato kaj kompato. Dum Jesuo pretigis stampi la novan interligon en sia propra sango, lia fervora preĝo al la Patro estis, ke tiuj, kiuj estis donitaj al li de la Patro, estus unu, same kiel li kaj la Patro estis unu. Kiam kristanoj malkovras ilian unuecon en Jesuo, ili partoprenas la gloron de Kristo antaŭ la Patro, kun la sama gloro, kiun li havis en la ĉeesto de la Patro antaŭ ol ekzistis la mondo. Kaj tiel, la interligitaj homoj de Dio ĉiam devas klopodi esti repacigita komunumo - unu kiu mem estas efika signo al ĉiuj popoloj de la tero pri kiel vivi en justeco kaj paco.

## **Preĝo**

Sinjoro,  
Ni humile petas, ke per via graco,  
la eklezioj tra la tuta mondo  
povas fariĝi instrumentoj de via paco.

Tra ilia kuna agado kiel ambasadoroj  
kaj agentoj de via resanigo, repacigante amon  
inter dividitaj popoloj,  
Via nomo estu sanktigita kaj glorata.  
Amen.

*La dekstra mano de Dio plantas en nia tero,  
plantante semojn de libereco, espero kaj amo;  
En ĉi tiu multaj homoj elŝipiĝis,  
ĉiuj liaj infanoj kunmetas manojn,  
kaj ili estu unu kun la dekstra mano de Dio.*



## LA EKUMENA SITUACIO EN KARIBIO

La kariba regiono etendiĝas de Bahamoj en la nordo ĝis Surinamo, Gujano kaj Franca Gujano (Kajeno) sur la sudamerika kontinento, kaj de Barbado en la oriento ĝis Belizo en Centra Ameriko en la okcidento. La komuna identeco de la Regiono estas bazita sur geografiaj konsideroj kaj ankaŭ sur kundividita historio de koloniismo, ekspluatado kaj rezistado kontraŭ fremda superregado, kaj sur komuna kultura konscio.

La ĉeesto de kelkaj el la eklezioj en la Regiono - ekz. la romkatolika kaj anglikana eklezioj - koincidas kun la komenco kaj fruaj jaroj de la koloniisma entrepreno. Aliaj eklezioj venis poste kiel parto de misiista movado de la 18-a kaj 19-a jarcentoj kaj la fruaj jaroj de la 20-a jarcento. Eĉ pli lastatempe, la evangeliisma kaj pentekostisma movadoj disvastiĝis tra tuta Karibio. Sekve, evangeliismaj ligoj aŭ kunfrataroj troveblas en multaj landoj kaj teritorioj de la Regiono.

La Kariba Konferenco de Eklezioj – KKE (*Caribbean Conference of Churches - CCC*) kreskis el vigla antaŭirinto de ekumena agado en la 1960aj jaroj, kaj estis formale establita dum la kultura kaj politika bolado de la fruaj 1970-aj jaroj. Ĉi tio okazis tuj post la koloniisma epoko de la Regiono, kiam multaj landoj akiris sian politikan sendependecon. Estis tempo kiam la tuta Regiono estis ĉirkaŭvolvita de movado al memdecido, evoluado kaj novaj formoj de sinesprimo. Kiel komuna respondo kaj kontribuo al ĉi tiu nova regiona konscio, kelkaj eklezioj fondis organizaĵon nomitan Kristana Agado por Evoluado en Karibio (*Christian Action for Development in the Caribbean - CADEC*). Ĉi tiu organizaĵo estas la antaŭirinto de KKE, kaj poste fariĝis unu el ĝiaj du ĉefaj fakoj. La alian fakon oni nomis Agentejo por la Renovigo de la Eklezioj (*Agency for Renewal of the Churches - ARC*).

La fonda kunveno de KKE okazis en 1973, en Kingston, Jamaiko. La antaŭparolo de ĝia konstitucio tekstas: Ni, kiel kristanaj homoj de Karibio, pro nia komuna alvoko en Kristo, interkonsentas kuniĝi en regionan kunularon de eklezioj por teologia pripensado, inspiro, konsultiĝo, kaj kunlabora agado, por superi la defiojn kreitajn de la historio, la lingvo, la kulturo, la sociaj klasoj kaj la distanco. Ni tial profunde devontigas nin progresigi la interpaciĝon, la integran evoluadon de nia popolo kaj insisti pri la sociala justeco kaj la digno de ĉiuj personoj. Ni promesas vojaĝi kune en Kristo kaj kundividi niajn spertojn por la fortigo de la regno de Dio en la mondo.

La tridek tri membroeklezioj de KKE reprezentas vastan diversecon de homoj kaj kulturoj, disvastiĝintaj trans multaj insuloj kaj la kontinentaj teritorioj de Suda kaj Centra Ameriko kaj kiuj apartenas al kvar ĉefaj lingvaj grupoj - la nederlanda, la angla, la franca kaj la hispana. Inkluzivitaj en ĉi tiuj grupoj estas: Kajeno (Franca Gujano), Kubo, Gvadelupo, Haitio, Martiniko kaj Portoiko. La membroeklezioj de la KKE kundividigas la komunan konvinkon ke, malgraŭ la malakordo de la longa koloniisma heredaĵo, kariba identeco ekzistas, aŭtentika kaj unueciganta, per kiu karibianoj devas esprimi la volon de Dio por si kaj devas fari sian respondon al ĝi.

Kiel unu el ses Regionaj Ekumenaj Organizaĵoj (REO-oj), la KKE estas historie unika, ĉar ĝi estis la unua en la mondo en kiu la romkatolika eklezio - formale per ĝia episkopara konferenco - estis fondinta membro de iu REO. La partopreno de la Episkopara Konferenco de Antiloj (AEC) kiel fondinta membro de la KKE estis prezentita kiel ekzemplo en la prepara dokumento - 'Lineamenta' - por la Sinodo de la Amerikoj de la Romkatolika Eklezio en 1997. En la sekcio de la dokumento titolita „Lokoj kaj Metodoj por Komuneco“, la dokumento deklaras: „Unu ekzemplo de pli granda ebleco por dialogo kun aliaj konfesioj estas montrata de la laboro de iuj episkopoj de Karibio, kiuj kontribuis al la fondo de la sola ekumena organizaĵo kiu ĉeestas en la regiono“ (Sekcio IV, Artikolo 42).

En la daŭro de la kvardek tri jaroj de ĝia ekzisto, la membroeklezioj de la KKE kune faris multajn iniciatojn en la fakoj de teologio, kristana edukado, integra evoluado, aferoj de gejunuloj kaj virinoj, la familia vivo, homaj rajtoj, kaj komunikado. Inter la gravaj atingoj de la KKE estas la amaskomunikilaj kanaloj *Contact* kaj *Caribbean*, la monata ĵurnalo *Caribbean Contact* kaj la serio pri kristana edukado *Fashion Me a People*.

En 1983, la mandato de la KKE estis reformulita por teksti: „Antaŭenigi ekumenismon kaj socian ŝanĝiĝon obeeme al Jesuo Kristo kaj solidarece kun la malriĉuloj“. De tiam, la Konferenco evoluigis strategian metodon kaj plenumis integran programan respondon al la multaj sociekonomiaj aferoj kaj sociaj perturboj kiuj efikas sur Karibion. Inter ili estas endemia malriĉeco, alta ofteco de infektoj de

HIV/AIDS, la kontraŭleĝa drogkomerco kaj drogdependeco, kaj elradikigiteco kiam homoj estas delokitaj pro diversaj kialoj - interalie kataklismoj, perforto kaj la serĉo de laboro kaj pli bona vivo.

La politiko de la KKE estas pli profunda eklezia engaĝiĝo kun - kaj reciproka akompano de - la membroeklezioj, per iliaj nunaj agentejoj kaj institucioj, kaj ĝis la nivelo de la lokaj ekleziaj anaroj. La ĉefaj programaj iniciatoj estas:

- Prioritataj Regionaj Iniciatoj (HIV/AIDS, drogoj, perforto, familio, nutraĵo, elradikigitaj homoj)
- Daŭrigebla Sociekonomia Evoluado (la malpliigo de malriĉeco, financoj por projektoj, prepariteco por katastrofoj)
- Kampanjado kaj Komunikado (publika konscio, informoj, dialogo kaj interŝanĝoj)
- Propagando kaj Komunikoj (publika konscio, informado, dialogo kaj interŝanĝo)
- Internaciaj Rilatoj (regiona integriĝo, solidarecaj vizitoj), kaj kulturaj aferoj.

Por solvi kelkajn el tiuj ĉi problemoj la Kariba konferenco de eklezioj (KKE) kunlaboras kun grandaj regionaj interregistaraj organizoj, ĉefe kun la Kariba komunumo (CARICOM). Ĝi ankaŭ engaĝiĝis dum jaroj kun diversaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj eŭropaj kaj nordamerikaj registaroj.

Krom la supre menciitaj iniciatoj KKE fondis Regionan forumon de naciaj konsilantaroj de eklezioj (NKE) kiel lokon por pli granda kunlaboro kaj reciproka akompanado de ĉi tiuj konsilantaroj en la regiono. Tio estis agnosko de la grava rolo, kiun ludas NKE en kelkaj partoj de la regiono. Kelkaj NKE - ekzemple la kuba kaj jamajka NKE – ekzistis kelkdek jarojn antaŭ KKE. La Forumo kunvenis la unuan fojon en la jaro 2001 sub la temo: „Kantu la novan kanton”. Poste ĝi ĉiujare kunvenis ĝis la jaro 2008. Simile kiel aliaj iniciatoj la Regiona Forumo devis estis limigita pro reduktita financado de la organizo.

Antaŭnelonge la sekretario de KKE forte emfazis la teologian bazon de la ekumenismo en la dialogo kun la membro-eklezioj. Tiamaniere oni volis plifortigi la fundamentan problemon de *koinonia* (komuneco), kiu estis iomete ombrigita pro tro granda emfazo al *diakonia* (servado). Tiucele oni certigis, ke okazu ne nur diskutoj pri ĉi tiu kaj aliaj problemoj de „kredo kaj ordo”, sed ankaŭ estu certigita „spaco de gastamo”, kie membroj de diversaj nomiĝoj – teologoj, klerikaro kaj aliaj – povas renkontiĝi en etoso de reciproka kompreno kaj edifado. Kun ĉi tiuj celoj en decembro 2014 oni lanĉis la Kariban regionan centron por ekumena renkontiĝo kaj dialogo. La fondo de ĉi tiu centro estas kunlabora entrepreno inter KKE kaj monaĥoj de la centjara benediktana monaĥejo de la Virgulino Maria de Ekzilo – fama kiel la Monto de sankta Benedikto – en Trinidado. (Surbaze de ĝia historia paŝtista servo al homoj de multaj diversaj religiaj konvinkoj, la monaĥejo estis konsiderita kiel natura medio kaj elekto por ĉi tiu iniciato).

Okazis ankaŭ nova engaĝiĝo de KKE koncerne aliajn ekumenajn esprimojn kaj figurojn – ekzemple la movado Taize kaj la kariba „filio” de la Tutmonda kristana forumo (TKF). Ĉi lasta estas grava ilo por misioj kaj la dialogo kun la evangelianaj kaj pentekostanaj kristanoj. KKE agis kiel helpanto de la kariba TKF.

Krom KKE ekzistas ankaŭ aliaj instituciaj esprimoj de ekumenismo en Karibio. Unu el la bonegaj esprimoj estas la Unuiĝinta teologia kolegio de Okcidenta Hindio (*The United Theological College of the West Indies - UTCWI*) en Jamajko. Kiel institucio ĝi estas kunlabora entrepreno de diversaj protestantaj nomiĝoj. Estas interese, ke ĝi troviĝas ĉe la Romkatolika teologia kolegio (kaj eksa seminario) de sankta Mikaelo. La prelegantoj kaj studentoj de ambaŭ institucioj havas tre amikan kaj reciproke edifan rilaton dum la kelkaj jaroj de la ekzisto de ĉi tiuj institucioj.

Sur pli vasta regiona nivelo ekzistas ankaŭ la Kariba Asocio de teologiaj lernejoj (KATL). Ĉi tiu organizo kunlabore kunligas la du ĉefajn teologiajn kolegiojn de la angleparolanta Karibio – UTCWI kaj la anglikana *Cordington College* (Barbardoso) kaj la du romkatolikajn kolegiojn: la Kolegio de sankta Johano Vianney kaj de la ugandaj martiroj – Trinidado (*St. John Vianney and the Uganda Martyrs*) kaj la Kolegio de sankta Mikaelo –Jamajko (*St. Michael's*).

Se temas pri protestantaj ekumenaj teologiaj kolegioj en la hispanparolanta Karibio, ekzistas la Evangeliana seminario de Portoriko kaj la Evangeliana teologia seminario de Matanzas en Kubo. Ambaŭ institucioj estas kunlaboraj entreprenoj de diversaj protestantaj nomiĝoj. Ĉi lastan nun estras

Rev. D-ro Carlos Emilio Ham, eksa prezidanto de KKE kaj eksa deĵoranto ĉe Monda konsilantaro de eklezio Tutmonda konsilio de eklezioj (TKE).

Priskribo de ekumena situacio en Karibio ne estus kompleta sen mencio pri tio, ke Karibio donis grandegan donacon al la pli vasta ekumena movado en la persono de Rev. D-ro Philip Alford Potter – ŝatata tria ĝenerala sekretario de la Tutmonda konsilio de eklezioj (TKE). D-ro Potter, nun forpasinta, estis metodista pastoro kaj li devenis el la Komunumo de Dominiko. Dum lia oficado kiel ĝenerala sekretario de TKE (1972-1984) li batalis kontraŭ la malmorala reĝimo de apartismo en Suda Afriko. Dum sia oficado, Papo Johano Paŭlo 2-a – responde al la invito de TKE – faris la historian viziton al la sidejo de MKE en Ĝenevo, Svisio. Ĝi estis grava mejloŝtono en la ekumenaj rilatoj inter Vatikano kaj TKE. Oni supozas, ke nuntempe estas 13 membro-eklezioj de TKE en Karibio, kio reprezentas 1,4 milionojn da kristanoj. Irante laŭ la paŝoj de Rev. Potter aliaj karibaj ekumenistoj kontribuas al la pli vasta internacia ekumena areno. Inter ili estas Rev. Neville Callam de Jamajko. Rev. Callam, nuntempa ĝenerala sekretario de Baptista tutmonda alianco (BTA), dum multaj jaroj estis tre respektata membro de Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj.

## KELKAJ GRAVAJ DATOJ ŜLOSILAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

- ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj
- 1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit)
- 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“
- 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- 1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- 1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto
- 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“
- 1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- 1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21)
- 1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- 1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- 1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
- 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- 2008: en la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

## PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ TEMOJ 1968-2017

*En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj.*

- 1968:** Por laŭdo de Lia gloro (Efe 1,14)  
**1969:** Vokitaj al libereco (Gal 5,13) (Prepara kunsido en Romo, Italio)  
**1970:** Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Kor 3,9)  
(Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)  
**1971:** ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Kor 13,13)  
**1972:** Novan ordonon mi donas al vi (Joh 13,34) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)  
**1973:** Sinjoro, instru nin preĝi (Luko 11,1)  
(Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)  
**1974:** Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Fil 2,1-13)  
(Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)  
**1975:** La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (Efe 1,3-10)  
(Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)  
**1976:** Ni estos similaj al li; (1 Joh 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas  
(Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)  
**1977:** Kune elteni en espero (Rom 5,1-5)  
(Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)  
**1978:** Jam ne fremduloj (Efe 2,13-22) (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)  
**1979:** Servu unu al la alia por la gloro de Dio (1 Pet 4,7-11)  
(Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)  
**1980:** Venu via regno (Mat 6,10)  
(Materialo de ekumena grupo en Berlino, GDR, prepara kunsido en Milano)  
**1981:** Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (1 Kor 12,3b-13)  
(Materialo de Graymoor Fathers, Usono – prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)  
**1982:** Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psa 84)  
(Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)  
**1983:** Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (1 Joh1,1-4)  
(Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny (Bossey), Svislando)  
**1984:** Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (1 Kor 2,2 kaj Kol 1,20)  
(prepara kunsido en Venecio, Italio)  
**1985:** De morto al vivo kun Kristo (Efe 2,4-7)  
(Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)  
**1986:** Vi estos miaj atestantoj (Ago 1,6-8)  
(Materialo el Jugoslavio/Slovenio, prepara kunsido en Jugoslavio)  
**1987:** Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (2 Kor 5,17-6:4a)  
(Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)  
**1988:** La amo de Dio elĵetas timon (1 Joh 4,18)  
(Materialo el Italio - prepara kunsido en Pinerolo, Italio)  
**1989:** Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (Rom 12,5-6a)  
(Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)  
**1990:** Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kreu (Joh 17)  
(Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)  
**1991:** Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (Psa 117 kaj Rom 15,5-13)  
(Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)  
**1992:** Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mat 28,16-20)  
(Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)  
**1993:** Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (Gal 5.22-23)  
(Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)  
**1994:** La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (Ago 4,23-37)  
(Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)

**1995:** Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (Joh 15,1-17)  
(Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)

**1996:** Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apo 3,14-22)  
(Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)

**1997:** Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (2 Kor 5,20)  
(Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)

**1998:** La Spirito helpas nian malfortecon (Rom 8,14-27)  
(Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)

**1999:** Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (Apo 21,1-7)  
(Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)

**2000:** Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efe 1,3-14)  
(Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna)

**2001:** Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Joh 14,1-6)  
(Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)

**2002:** Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psa 36,5-9)  
(Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)

**2003:** Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj (2 Kor 4,4-18)  
(Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)

**2004:** Mian pacon mi donas al vi (Joh 14,23-31)  
(Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Sicilio)

**2005:** Kristo, unika fundamento de la Eklezio (1 Kor 3,1-23)  
(Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestaň, Slovakio)

**2006:** Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mat 18,18-20)  
(Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)

**2007:** Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (Mar 7,31-37)  
(Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges, Francio)

**2008:** Preĝu senĉese (1 Tes 5, 12a.13b-18)  
(Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)

**2009:** Ke ili fariĝu unu en Via mano (Eze 37,15-28)  
(Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)

**2010:** Vi estas atestantoj pri tio (Luk 24,48)  
(Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)

**2011:** Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Ago 2,42) (Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)

**2012:** Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (1 Kor 15, 51-58)  
(Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)

**2013:** Kion la Sinjoro postulas de ni (Miĥ 6, 6-8)  
(Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)

**2014:** Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17)  
(Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo, Kanado)

**2015:** Donu al mi trinki (Joh 4,7)  
(Prepara materialo el Brazilo, kunsido en São Paulo)

**2016:** Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio (kp. 1 Pet 2,9)  
(Prepara materialo el Latvio – kunsido en Riga)

**2017:** La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo (kp. 2 Kor 5, 14-20)  
(Prepara materialo Germanio)